# LIBERA LABORISTO

Oficiala organo de
Tutmonda Ligo de
Esperantistaj Senŝtatanoj.
<TLES>






Redaktejo: J. M. Esperanto
9, rue Louis Blanc, Paris X

Administrejo: Artur Bolle
Tresckowstr. 58, Berlin N 58

**1a Jaro** **Decembro 1925** **No. 3**


*Pri la enhavo de sia artikolo estas reipondeca ĉiu verkinto mem; la redaktado nur estas teknika. La abonprezoj montrataj en la koncerna listo validas por ses nroj. Specimena ekz. estas ricevebla nur je antaŭa pago de ⅕ de ĉi sumo. Poŝtmarkoj (krom germanaj) ne estas akceptatoj.*

## Al la tutmonda laboristaro!

K a m a r a d o j ! *La hungara ekzekutjuĝistaro estas preta pliriĉigi sian multkrimaron per nova krimo . . . La hungara komunisto Rákosi kaj nombro de revoluciaj laboristoj falis en la manojn de la hungara registaro. La kaptitoj estas traktataj plej abomene, ili estas turmentataj por elpremi konfeson. Ili estas kulpigataj je preparo de komunista revolucio. Ilia vivo estas en danĝero.*

*Kamaradoj! Ni scias, ke Rákosi estis fanatika kontraŭulo de la anarkiistoj en Ruslando, kaj li ne hontis, deklari, ke ĉiuj anarkiistoj devus esti enkarcerigataj kaj ekstermataj. Rákosi estas kontraŭulo de la libereca, kontraŭŝtata revolucia laboristmovado.*

*Kvankam ĉi ĉio estas konata al ni, ni tamen alvokas la laboristaron je protestoj kontraŭ la tia agado de la hungara registaro. Laŭtigu vian voĉon kontraŭ la blanka Hungario, kiu sub preteksto de ordo dronigas en sango ĉiujn revoluciajn kaj liberecajn celadojn.*

*Demonstradu ĉe la hungaraj ambasadorejoj. Sciigu pri via solidareco en la laborejoj kaj publike por ĉiuj viktimoj de la reakcio, kiuj ajn ili estas kaj kie ajn ili estas turmentataj.*

*For la hungara ekzekutjuĝistaro!*
*For la internacia reakcio!*

*Sekretariaro de Internacia Laborist-Asocio.*

## Revoluciaj Esperantistoj persekutataj.

*Ricevis ni la informon, ke la konataj en tutmondo revoluciaj esperantistoj* N. F u t e r f a s (M o s k v o) kaj A. L e v a n d o v s k i (S a r a t o v) *estas arestitaj de GPU (Ĉeka). Kaŭzoj de la arestigoj estas ne sciigataj, sed ne estas dubo, ke ambaŭ esp-revoluciuloj estas arestitaj pro la sama kaŭzo kiel Aron Baron, B. L[illegible]binĉik-Majer kaj la multaj aliaj revoluci-aktivuloj. Ni estas certaj, ke kunsentas nian indignon kontraŭ ĉi fiuzo de la "diktaturo de la proletariaro" ĉiuj laborist-esperantistoj de la mondo, kaj ke ili kun ni senrezerve postulas la tujan reliberigon de ĉiuj antaŭbatalantoj de la mondrevolucio enkarcerigitaj en Ruslando same kiel en Hungario kaj aliaj landoj.*

*Sekr. de TLES.*

## ENHAVO.

(Ĉi tiu kajero ampleksas 20 paĝojn.)


*De kio komenci?* (Orig.) De *Rusano* . . . . . . . . . 34
*Perforto aŭ senperforto?* Speziale verkita por L. L. de *M. Mratschny* . . . . . . . . . . . . . . . . . 35
*La Ĝenerala laborista Unio* (Unueĉ-Organizajo) *Germana.* II. Parto Speciale por L. L. kompilita de *Ino* . . . 36
*Perforto aŭ senperforto!* De *Josef Eder*, Peranto por TLES en Aŭstrio . . . . . . . . . . . . . . 37
*Por prieduka rubriketo. E. Stern* . . . . . . . . . 37
*La batalo pro la ĉiutaga pano.* De *Rudolf Rocker*, tradukis L. Heinrichs . . . . . . . . . . . . . . 38
TRA LA MONDO LIBERECANA:
*Disvolviĝo kaj celoj de ILA.* Originale de A. Souchy . . . . . . . . . 42
*Raporto pri la kongreso de UA.* Spec. de *J. M.* . . . . . . . . . . . . . 43
*Revenĝo al Osugi.* Spec. raporto de niaj japanaj kdoj . . . . . . . 43
*Pri la foririntoj* . . . . . . . . . . . . . . . 44
*La "ruĝa" reakcio.* El Bulteno de *l'Unuigita Komitato* . . . . . . . 45
LABORISTA MOVADO:
*El la presservo de ILA.* (Bulgario, Italio, Brazilio, Sud-Amerika kroniko) . 45
*Laborbataloj en Germanio Laborista movado en Belgio — El Ĉeĥoslovakio* . . . . . . . . . . 48
TUTMONDA LIGO DE SENŜTATANOJ . . . . . . . 49
Bibliografio . . . . . . . . . . . . . . . . . . 51
Korespondado, anoncoj . . . . . . . . . . . . . 52


"Kial vi verŝas akvon sur mian kapon?" diris la mortanta sklavo al la misiisto. — "Por ke vi eniru la ĉielon." — "Mi ne deziras eniri ĉielon, kie estas blankuloj", diris li, forturnis la vizaĝon kaj mortis.

J. G. Herder.

*

Anarkiismo estas ne nur sociala teorio, ĝi estas ankaŭ sociala taktio. L'Anarkiismo starigas kaj serĉas praktikajn metodojn de l'agado.

Borovoj.

**Gekamaradoj, Gelegantoj! Jam nun pagu viajn kotizojn kaj abonojn por 1926!**

apogas jen sur unu, jen sur alia klaso kaj trompas ĉiujn klasojn por konservi sian povon.

Tiel estis kaj tiel estos. Ĉiu partio, kiu ekposedis la ŝtatpovon en nomo de popolo direktas poste sian armitan pugnon kontraŭ la popolo mem. Ĉiu ŝtataparato neeviteble degeneras en burokratisma maŝino, kiu sufokas ĉion ekster tiu aparato.

El kio do estas farata la forto de l'malamata de popolo bolŝevika povo? Samkiel faŝismo ĝi estas forta per la diseco, neorganiziteco kaj politika malklero de la kamparanoj, per laciĝo kaj malreviĝo de la laboristaj masoj trompitaj de la dua kaj tria internacioj kaj per la forta militarisme organizita aparato de la militema kaj disciplinita malplimulto en Italio, tiu de faŝistoj, en Rusio, tiu de komunistoj. Kion komunan havas anarkiismo kun tiu diktaturo?

Ne, ni havas nenion por aldoni al niaj malnovaj ideoj. Nenion ni povas lerni de la perfortuloj de la revolucio.

Pura kaj nemakulita ni devas antaŭenporti nian standardon. Do kia estas nia taktiko? Ni nature ne povas subteni la bolŝevikojn. Tio estus la plej granda krimo kontraŭ la popolo kaj kontraŭ la revolucio. Sed ni ne ekstaros kontraŭ ilia registaro kun armiloj en mano, ĉar en la nuna internacia stato la lando, kie la alilanda kapitalismo intencas forigi la efikojn de la vilaĝana revolucio okazinta en 1917—1920, estus drônigita en sango kaj la venko de la rusa kontraŭrevolucio estus signalo por la reakcio en la tuta mondo. Ni devas ankoraŭ longtempe gvidi tra tuta Rusio kaŝan kaj sisteman propagandon de anarkiismo.

Estas necese fondi sekretajn presejojn, eldoni flugfoliojn pri aktualaj temoj, gvidi laboristojn al batalo kontraŭ fabrikeja burokratio kaj kamparanojn al batalo kontraŭ vilaĝaj perfortuloj.

Al tiu laboro devas helpi bone organizita eksterlanda revuo, kiu per ĉiuj vojoj penetros Rusion. Ni devas batali kontraŭ la polica diktaturo de la bolŝevikoj en la sindikatoj, sovjetoj kaj ruĝa armeo, senmaskigi komunistajn ĉelojn, denunci la komunistajn burokratojn veki liberan memagemon de la masoj. Ni devas postuli transdonon de la industri-administrado al la sindikatoj de laboristoj kaj oficistoj emancipitaj de la protekto de kom. ĉeloj. La gvidado de la agrikultura mastrumo devas transiri iom post iom al liberaj kooperativaj unuiĝoj. Ni devas deklari militon al militservo, kiel instituo de popola sklavigo. Ni postulos liberajn balotektojn al liberaj sovjetoj. Bolŝevika malliberejo nomata U. F. F. G. devas fariĝi libera unio de liberaj popoloj, kiuj amike iros al la plej granda feliĉo, al anarkio. Sed nia laboro en Rusio restos senfrukta, se al ni ne etendos la manon internacia federacio de anarkiistoj.

Bolŝevismo estas internacia malfeliĉego. En ĉiu lando ekzistas grupo de bolŝevikaj funkciuloj, kiuj revas pri uzurpo de la povo kaj pri starigo de "Diktaturo de Proletaro". Europa bolŝevismo sin nutras per postmilita mastruma kaoso, per nekapableco de la burĝaro, per la perfido de la socialdemokratoj kaj per la mono de la sovjeta registaro.

Internacia anarkiismo devos, por sia savo, krei firman internacian organizajon por montri al tuta laboranta kaj pensanta homaro, ke ekster la faŝista bastono kaj la bolŝevika knuto ekzistas vojo al libero, humaneco kaj feliĉo.

*Rusano.*

---

# Perforto aŭ Senperforto?

*De M. Mratschny.*

Kiu diras: "kapitalista ordo", tiu diras: senhonta, senkonscienca ekspluatado de milionoj kaj plu milionoj da laboristoj, konstanta krizeco, kiu kaŭzas senlaborecon kaj militojn. Kapitalista ordo, tio signifas: malhonorigi laboron je malbenindeco, igi prostitucion al sola akirebleco de ekzistrimedoj por multmiloj da virinoj, spirita sklaviĝo, malklerigo kaj idiotiĝo de sennombrebla laboristoj. Kaj ĉar ni plene jesas la vivon, kaj ĉar ni deziras ĝin ĝoja kaj hominda kaj ĉar ni volas vivi kiel homoj, ĉar ni volas liberiĝi interne kaj ekstere, liberigi ĉiujn niajn kreopovajn fortojn, tial ni estas anoj de la ideo pri la revolucia klasbatalo: Ni sopiras la socialan revolucion.

Kiu diras: "sociala revolucio", tiu diras: Forigo de la mastrumaĉado, kiu regis ĝis nun, forigo de la profitcela kaj ekspluata mastrumado, novorganizo de la socio sur bazo racia, homeca kaj etika, pli responda al la malfalsa scienco. Sociala revolucio, tio signifas: ne nur ekonomia liberigo, sed samtempe ankaŭ liberigo el sub la spirita jugo de la ŝtato kaj kapitalismo. Nur danke al la sociala revolucio la laboristamasoj iĝos el subjugitaj sklavoj liberaj kaj laboremaj produktantoj. Nur la sociala revolucio permesos al ni, iĝi aliaj, pli bonaj kaj pli homaj homoj.

Ĉar estas neeble en la nuna socio, eduki liberajn senantaŭjuĝajn estontecohomojn — ni jam profete imagas la belecon de la estonta antiaŭtoritata socio de la liberaj produktantoj, tamen ni staras ankoraŭ je ambaŭ piedoj en la nuna marĉo —, ni devas, estantaj kiaj ajn neperfektaj kaj makulitaj per heredaĵoj de la estinteco, *tiaj, kiaj ni estas,* batali por la estonteco.

La sola vojo, laŭ nia opino, al nia liberiĝo estas la revoluciigado de la vicoj de niaj laborfratoj, la *organizo* de ĉiuj ekspluatataj man- kaj kaplaboristoj al konstanta persistema batalo por pli bona vivo nun kaj por la akiro de nia idealo: la libera, vere homa socio. Ĉiutage persisteme kaj decide ni devas daŭrigi ĉi tiun batalon, ni devas klerigi niajn laborfratojn, veki kaj organizi ilin. Senton de la proletariaro pri propra malvaloro, ĝian kredon pri la neŝanĝebleco de la nuna "ordo", ĝian emon atendi ĉion de la politikistoj, gvidistoj kaj partioj (kiel revoluciaj ili eĉ ŝajnigu sin) — ĉi ĉion ni daŭre kaj konstante devas kontraŭbatali. Milionoj da laboristoj mekanike asertas: La liberigo de la laboristaro estas la afero de la laboristoj mem . . ., sed ili ne estas trapenetritaj de la profunda psikologia vereco de ĉi ideo. Ili ne scias, kiel malfacila estas la vojo, la vojo al la ekonomia kaj spirita liberiĝo. La nunaj potenculoj, la ekspluatantoj kaj gvidantoj de la nuna mondpolitiko nenian kaŭzon havas por lasi sin varbi al *paca* transformigo de la socio. La nuna stato sufiĉe plaĉas al ili. Kaj ili estas pretaj per *ĉiuj* rimedoj kontraŭbatali la revolucian vekiĝon de la proletariamasoj. Ni ne estas amikoj de la perforto. Ni ja celas al kreo de nova socio, en kiu estos ĉesinta la ekspluatado de la homo per la homo kaj la subjugigo de la viro-homo-produktanto kaj la subjugigo de la virino kaj de la infano. *Tamen, ni kalkulas pri la realeco.* Kaj la realeco en nia ĉiutaga vivo instruas al ni, ke oni devas streĉi ĉiujn fortojn, ke oni devas persisteme bataladi por krei ian novon. La sama en pli granda mezuro validas, por nia klasbatalo, por nia batalo por la sociala revolucio.

La plej bona kaj plej uzebla pafilo en nia batalo estas la rifuzo de nia laboro: la ĝeneralstriko. Sed la spertoj faritaj dum la lastaj jardekoj povas montri ankaŭ al la plej malsaĝa el ni tutsufiĉe, ke la ekspluatist- kaj regantoklasoj neniel toleros la rifuzon de niaj laborfortoj pacamanieran. Policistaro, "justeco", gazetara fiincito, militaj flugmaŝinoj, maŝinpafiloj, kanonoj, venenaj gasoj senkompateme ekfunkcios kontraŭ la strikanta proletariaro. Kiu serioze diras: Ĝeneralstriko, kiu ne volas uzi ĉi ideon nur kiel senkarnan, senaniman parolon, tiu ankaŭ devas diri: *Perforta* okupacio de la fabrikejoj, de la minejoj kaj ceteraj laborejoj, *perforta* eksproprigo de la eksproprigintoj, civitana milito, stratbatalo.

*Ni troviĝas en civitmilito.* La nuna kapitalisma ordo ja estas kaŝita civitmilito. Ĝuste, kaŝita, ornamita per hipokritaj belaĵoj (demokratio, libereco kaj egaleco por ĉiuj ŝtatanoj aŭ — "diktaturo de la proletariaro", rusa eldono). Ja, por eliri el ĉi mizero, por doni fortan baton al ĉi socio, por pereigi ĝin, kaj por konstrui veran ordon, ni devas ne eviti la agon. Tial la proletariaro devas ekzameni siajn fortojn en la revoluciaj klasorganizaĵoj. La perfortregado de la burĝaro devas esti kaj estas pereigota per perforto.

Por esti sukcesoplena, por vere celi al vera novkreo de la socio nia ĝeneralstriko do devas havi duoblan, *kombinitan* karakteron: *Ĝeneralstriko* plus *Ĝeneralribelo.* Malgraŭ nia abomeno kontraŭ sangoverŝo, malgraŭ la naŭzo, kiun ni sentas pro homomortigo, ni *devas* se ni seriozas pri sociala revolucio, se ni ne estas mondfremdaj revemuloj kaj belspirituloj iri ĉi tiun malfacilan kaj oferoplenan vojon. *Aliaj ebloj,* kiom ajn ni tion bedaŭras, *ne ekzistas.*

---

**Provizore „L. L." aperas 16 paĝa dumonate.**

**Zorgu, ke gi aperos 32 paĝa ĉiumonate.**

# La Ĝenerala laborista unio (Unuec-Organizaĵo) Germana.

## II. De la novembra revolucio ĝis la fondo de la Generala Laborista Unio de Germanio.

*II. Parto.*

Ni parolis en la unua parto de nia verketo pri la revoluciaj grupoj en Germanio dum la mond-milito. Kion ajn komunan tiuj grupoj havis, tamen ne povis rezulti pli malvasta kuniĝo de ili. Certe en ĉiuj grupoj oni bone lernis el la januara striko 1918. La antagonismo inter la revoluciema laboristaro kaj la instancoj de la centraj asocioj kaj de la partioj iĝis pli kaj pli granda. La proletaro ekkonis, ke la batalo de la laboristoj nur povis esti farata *kontraŭ* la socialpatriotaj parti-kaj metiunuiĝ-gvidantoj. Pro la influo de la pli kaj pli premanta situacio en Germanio kaj de la rusa revolucio la alfluo al la revoluciemaj grupoj ĉiam pligrandiĝis. Oni ja ne atingis klarecon pri la organiza problemo; tamen almenaŭ okupis sin grandaj partoj de la revolucie agantaj kunuloj pri la ideo de unuec-organizo, t. e. organizo, kiu faru la politikan kaj ekonomian batalojn kiel unuecan batalon.

Grandan meriton akiris en tiu rilato precipe la "Laborista Politiko" ("Arbeiterpolitik"), kiun aperigis la maldekstraj radikaluloj en Bremen. En n.ro 22 de la IIa jarkolekto (la 2an de Junio 1917) tiu ĵurnalo publikigas artikolon de Karl Vollkommen pri "la fundamentado de nova laborista organizaĵo", kie oni legas interalie:

"Nia celo estas la unuec-organizo, kiu ampleksas kun la meti-unuiĝo ankaŭ la politike organizitan laboristaron. Tial ni adresas al ĉiuj opozantaj laboristoj la alvokon: diskutu tiun demandon en viaj metiunuiĝoj kaj asocioj! Ĉiuj grupoj kaj organizaĵoj, kiuj interkonsentas pri la ideo de unuec-organizo, komencu la preparan laboron! Unue estu farata ĝisfunda diskutado pri la tuto de la laborista movado. La rezulto el tiuj debatoj en la unuopaj lokoj povas servi kiel bazo de kunvokota konferenco. La tempo por kreado de unueca laborista organizo estas nun speciale oportuna."

Per tiu alvoko la vojo estis malfermita al diskutado pri nova pli bona organizado de la laboristoj. Ekzemple membra kunveno de la Sendependa Socialdemokratia Partio Germania (USPD) en Köln a. Rh. la 9an de Marto 1918 ĉiukonsente (nur unu voĉo kontraŭ) akceptis post multhora debatado pri la metiunuiĝa problemo proponon, en kiu la parti-gvidantaro estas invitata "iniciati la fondon de politika kaj metiunuiĝa problemo en ĉiuj lokaj grupoj". Oni komprenas, ke la centra gvidantaro de la USPD jam antaŭe sin turnis kontraŭ la fondado de novaj organiziĵoj. Kaj — kvankam ĝi tiamaniere ne povis neniigi la novajn ekkonojn de la laboristoj — tamen la sintenado de la centra komitato de USPD deturnis kelkiun aŭtoritateman laboriston de tiu afere. Sed spite USPD la ideo aliris ĉiam pli grandajn rondojn.

En nro 35 de la IIIa jarkolekto Ikarius jam skiżas konstruan bildon de la venonta unuecorganizo kaj ankaŭ parolas pri la "uzin-organizo", elirante de la ekkono, "ke la ĉelo de la laborista organizo estas la ejo de la laboro, do la uzino, kaj ke la unuecorganizo devas konformi al tiu fakto".

Aliflanke la ideo pri sovjetoj aŭ konsilantaroj enkondukis la ideon de kunigo de la laboristoj ĉe la laborejoj kaj uzinoj. Se konforme al tiuj ekkonoj la nova organizo ne estis kreita, oni tamen spirite alproksimiĝis al ĝi kaj progreso povis esti konstata.

Pli kaj pli alproksimiĝis la tago de la granda venĝo. La fronto de la germanaj imperialistoj estis rompita. La malsato kaj la mizero pli kaj pli grandiĝis; la subpremo pli kaj pli krueliĝis. Oni eknomis la novan "Popolan Registaron" sub la princo Max de Baden, en kiun du socialdemokratoj estis akceptataj kiel ministroj. Sed ankaŭ tio jam ne povis helpi. Bulgario kaj Aŭstrio-Hungario faris apartajn traktadojn pri militpaŭzo kun la "Entente". Ĉie fermentado kaj boletado. Nun la admiralaro volis ekbati por la lasta fojo; la ŝiparo devis ekveturi. La ŝipistoj rifuzis. En Kiel, milit-haveno, ribelo sekvis, la ribelo etendiĝis trans la tutan imperion. La novembra revolucio okazis!

La imperiestro forkuris Holandon; la princoj abdikis; la registaroj eksiĝis. Kiel tronaspirantoj nun aperis socialdemokrataj imperiaj kaj ŝtataj prezidantoj, kaj same la socialdemokratia oficistaro okupis la liberigitajn ministrajn seĝojn. Kaj kion faris la proletariaro?

Ĝi elektis laboristajn kaj militistajn konsilantarojn. La regan potencon en tiuj konsilantaroj havis certe kiel ĉie tiuj, kiuj depost aŭgusto 1914 perfidis kaj vendis la proletariaron: la partiaj kaj metiunuiĝaj oficistoj. Anstataŭ altiri al si la potencon ekonomian en fabrikoj kaj uzinoj ĝi fidele sekvis la ordonojn de la perfidaj parti- kaj metiunuiĝ-oficistoj. Kaj kiam pli poste dum la kongreso de la laboristaj kaj militistaj konsilantaroj la malfirmigo de tiuj konsilantaroj okazis, la potenco jam plene estis en la manoj de la registaro. Nenia sistemŝanĝo efektiviĝis per la novembra revolucio. Restis la ĉiama salajra sklaveco la privata proprajo de produktadrimedoj, la rajto de la ekonomia pliforto al ekspluatado de malpliforto. Ŝanĝiĝis nur la kuliso: el la monarkio fariĝis burĝa respubliko, anstataŭ Vilhelmo la IIa nun la "socialdemokrato" Ebert sidis sur la trono.

Tion mi devis diri preterire por karakterizi la situacion de novembro 1918. Sed ni revenu al la organizo de la revoluciemaj laboristoj!

De la 30a de Decembro 1918 ĝis la 1a de Januaro 1919 ekazis en Berlin la fonda partikunveno de la komunista partio (Spartakus-Ligo). Tiam la maldekstraj radikaluloj en Bremen, la grupoj de la Internaciaj Socialistoj de Germanio kun la Spartakus-Ligo kuniĝis kiel Komunista Partio. Jam dum tiu unua partikunveno ekestis disputoj pri la rilato de la partio al la ekzistantaj metiunuiĝoj. Estas rimarkinde, ke precipe la reprezentantoj de la grandindustriaj regionoj, Rejnland-Vestfalio kaj Hamburg, pledis por la eliro el la metiunuiĝoj kaj la fondo de novaj organizaĵoj. Ekzemple Froehlich el Hamburg pledis por formado de ekonomie-politika unuecorganizaĵo.

La jaro 1919 estis plena de grandegaj luktoj de ekonomia kaj politika karaktero. Striko sekvis strikon. En Berlin okazis bataloj de armitoj. Ekestis la tiel nomata Spartakus-Ribelo. Okazis ribeloj en Bremen, Hamburg, Braŭnschweig kaj en aliaj urboj. Sekvis la München-a Sovjet-respubliko. Je ĉiuj tiuj bataloj la komunistoj partoprenis en la unuaj rangoj kaj certe en tiu tempo ili funebris iliajn plej grandajn perdojn. Tial oni ankaŭ komprenos, ke en tiu tempo la interna konstruado de la organizo ege suferis. Dum somero 1919, post kiam ĉiuj ribeloj de la revolucia proletaro estis suben batitaj, en Frankfurt okazis konferenco kontraŭleĝa de la komunista partio, kiu decidis pri la sintenado koncerne la donitan politikan kaj ekonomian situacion. Tie unuafoje oni principe diskutis pri la ideo de uzina organizo rilate al la stato de la revolucio. La centralo de la Komunista Partio Germania diris: La proletariaro ne estas matura por la proletaria revolucio. La malvenkoj en la bataloj depost novembro 1918 tion pruvas. La proletariaro unue devas lerne fari siajn batalojn. Tial ni devas fari la politikajn batalojn per demonstracioj ktp. Krome oni denove pledis por partopreno je la parlamentaj balotoj, kiun oni malakceptis en la fonda parti-konferenco. Koncerne la problemon de la metiunuiĝoj oni pledis por la restado en la centraj metiunuiĝoj, kvankam jam grandaj partoj eliris el tiuj kaj estis fondintaj novajn uniojn. La opozicio eliris el la supozo, ke la pezocentro de la revolucio estas transmetita de la strato en la uzinon; ke konsekvence oni devas fondi uzinorganizaĵojn, ĉar la malnovaj centraj metiunuiĝoj jam ne kapablas por radikala transformo.

Decido en tiu konferenco nenion rezultis. La centro mem ne kapablis klarigi al si tiun demandon. Unuflanke ĝi mem ekvivigis la "Uzinan Organizaĵon de la Trafiko" kaj aliflanke ĝi malkonsilis la eliron el la metiunuiĝoj. Sed intertempe jam en la karbminejа laboristaro formiĝis la "Libera Unio de Minejistoj", kiu ankaŭ aperigis propran gazeton. Same en la

nordo ĉe la mara bordo, en Hamburg kaj Bremen, sin montris la unuaj uzinorganizaĵoj.

En Oktobro 1919 okazis la dua partikonferenco de la Komunista Partio Germania. La centralo proponis gvidrezolucion (la t. n. Heidelberga gvidrezolucio, nomita laŭ la loko de la konferenco), de kies aprobo la partopreno je la partia konferenco devis dependi. La gvidrezolucio postulis interalie la partoprenon je ĉiuj parlamentaj balotoj kaj la restadon en la metiunuiĝoj. Tio certe por la Komunista Partio signifis skismon. Laŭ la gvidrezolucio la plej granda parto de la ĝisnunaj membroj estis eksigataj el la partio. La eksigita parto faris intensivan propagandon por kreado de uzinorganizaĵoj kaj unioj, kaj ĉie tiaj estis fondataj. En Bremen aperis baldaŭ post la skismo la "Batala Voko" (Kampfruf). La Laborista Unio en Bremen ankaŭ estis komisiata, kunvoki plej baldaŭ konferencon de ĉiuj unioj kaj uzinorganizaĵoj de Germanio. Tiu konferenco devis kunigi la uniojn de la tuta Germanio kaj krei normojn por ilia taktiko en la venontaj luktoj. En printempo 1920 tiu konferenco kunvenis en Hannover. Vizitis ĝin reprezentantoj el ĉiuj partoj de Germanio. La konferenco estis eltrovata de la polico kaj la partoprenantoj arestataj. Tamen la ĉefaj punktoj de la taktiko kaj organizo povis esti fiksataj. Oni decidis decentrigon de la administrado, nepartoprenon je la baloto por la laŭleĝaj uzinkonsilantaroj kaj rifuzon de la baloto por la parlamentoj. Tia estis la fondo de la "Ĝenerala Laborista Unio Germania". Kaj nun komencas la propra historio de tiu movado. *Per "Ino".*

# Perforto aŭ senperforto!

Okaze la diskutojn pri la tagordo de la dua Austria landkongreso anarkiista en Wien, 12—16an de aprilo, la junulargrupo en Graz diskutis ankaŭ pri la temo: "Perforto aŭ senperforto!" Preskaŭ ĉiuj kdoj deklaris sin favore al senperforto. Kelkaj eksterlandaj kdoj raportis pri sia taktiko de perforto. Ili diris, ke kelkafoje oni estas devigata ekpreni armilon pro sia defendo. Por povi juĝi pri tia okazo, oni devus travivi ĝin en la lando mem.

Sed el la historio ĉiutempa oni povas sperti, ke la revoluciema movado ne profitis el siaj armitaj atakoj. Sekvis ĉiam enkarcerigado kaj mortigado de centoj kaj miloj de homoj valoraj por la movado, kaj por la vivantoj okazis spirita kaj ekonomia subpremado.

Alifoje oni ja atingis la memstariĝon, sed nur dum mallonga tempo. Iu diktatoro ekstaris kaj la endormiĝinta pro siaj sukcesoj popolo denove estis ĵetita en subpremadon kaj ekspluatadon, denove en mizeron per siaj propraj "fratoj" uzintaj la povon popolan por siaj egoistaj, regemaj celoj. Ĉu la revoluciema movado profitis el la bombatencoj al superuloj, imperiestroj? Tute ne, ĉar aliaj eĉ pli tiranaj superuloj ekstaris, persekutantaj la malkontentan laboristaron, neigantaj la individuecon. Kaj denove oni devis serĉi kunbatalantojn, ekinterligi disigitajn interrilatojn. Sekve egaj malfacilaĵoj, ega malprofito!

Kion utilus, se la popolo subite estus liberigita el siaj ĉenoj, de siaj subpremantoj kaj aŭtoritatoj? Ĉu la popolo plejgrandparte mem ne deziras kaj apogas ilin? Ĉu ĝi ne mem apogas tiujn instituciojn kaj la agadon de l'superuloj? Plejgrandparte ĝi mem ja estas kapitalistema, egoista, regema. Ĝi atakas la kapitalistojn nur pro propra nepovo, senposedo. Kaj ĝia celo estas la sama: regeco kaj profitemo.

Per armiloj oni ne povas revoluciigi la mondon, ĉar ĝi tiam aniĝus nur pro l'timo je la batoj. Sed favorokaze ĝi forlasos la revoluciemon movadon kaj estos bonaj iloj por la reakcio.

Pro tio ni unue klerigu la homojn pri racia pensado laŭ la devizo: "Provu ĉion (sed provu vere) kaj retenu la bonon!" Pri racia vivado, nature sen alkoholo kaj nikotino, sen spiritaj venenoj de kino kaj teatro, dancejoj; fine pri reciproka helpo, solidareco kontraŭ aliaj homoj. Se la homaro konsciiĝus, ke ĝi mem kapablas forigi ĉian peron por sia subpremado per aliaj — ke la homoj per aktiva kaj pasiva ĝeneralstriko, per nepartopreno al fabrikado de armiloj, per posedpreno de fabrikejoj kaj tereno povas ĉesigi ĉian intermakleradon; ke ili povas forigi militon per rifuzo de ĉia militlaboro kaj-servo: tiam ili povus liberiĝi kaj feliĉigi sen uzo de armilo, sen devigo, sen perforto.

Sed antaŭ ĉio ni mem "Homiĝu"; poste ni povos aliajn "Homigi!"

La muntempa homaro estas jam tro venenigita, tro malvigla. La junularo estas destinata, celi kaj trafi tion. Al la junularo povas brili la matenruĝo de l'libero.

Malsato kondukas al ribelo,
Spirito kondukas al revolucio!
Nek dio, nek ŝtato, nek papo,
Ni mem liberigu nin!

*Josef Eder,* Peranto por TLES por Austrio.

# Por prieduka rubriketo.

## Ĉu en „Libera Laboristo" prieduka rubriko ne utilus?

Mi jese opinias kaj volas kelkvorte klarigi mian diron. Temas nek pri teoria edukado de gelernantoj nek pri ŝtataj lernejoj kaj ties komuna netaŭgeco, ĉar ĉi-tio eble estus teda por kelkaj legantoj kaj plue studo de tiaj problemoj postulas, miaopinie, teknikajn fakajn revuojn. Temas fakte pri ĉiutaga familia edukado de geinfanoj ĉe anarkiemaj familioj kie la gepatroj ne volas uzi la kutimajn edukmanierojn, kies inspiro plejofte estas aŭtoritatema — sed kontraŭe deziras veki personecon kaj bonvolecon de la karegaj buboj.

Opinioj kaj raportoj de ti-kiuj provis tian delikatan kaj malfacilegan taskon certe estos ĝojakceptataj de ĉiuj. Mi sube donas tradukon de artikoleto, kiu rilatas la problemon kaj esperas, ke tiu rubriko trovos multajn kunlaborontojn.

*E. Stern.*

### Unua maksimo: lasu ilin trankvilaj!

Unu tagon homoj festantaj, truditaj restadi dome pro daŭra pluvo, petis paroladeton de maljuna ĉeestanta instruisto. Tiu-ĉi — estis mem Paul Robin — profitis la procirkonstancan okazon por pledi favore al infanoj kaj peti, ke oni lasu ilin trankvilaj, ke oni ne ĉikanu ilin ciumomente pro malgravaĵoj, ke oni respektu plej eble ilian pri ĉio iniciaton, iliajn spontaneajn observojn kaj movojn.

Iom poste, unu el la aŭdintinoj juna patrino suficê nerva — kiun oni kelkfoje rimarkis pro tio, ke ŝi tre malmilde skuis sian infanon, — ekkriis, al Robin montrante sian bubon tri- aŭ kvarjaran ĝenerale mildan kaj paciencan:

— Nu, sinjoro, al mi diru: Kion oni devas fari kun tiu infano? Ne volas min aŭskulti la eta monstro!

— Al ĝi ne parolu.

— Mi klarigas, ke ĝi ne volas al mi obei!

— Al ĝi nenion ordonu.

— Tiaokaze ĉu oni devas obei ĉiujn ĝiajn kapricojn?

— De li ne obeigu la viajn.

— Tiel, infanoj estas ja ĉiam pravaj!

— Ofte malpravaj estas la gepatroj.

— Fine, kion fari.

— Nenion.

Kiuj volas kiel eble plej bone eduki infanojn, tiuj devas ilin konsideri ne kiel malamikojn venkendajn, sed ĝis ia kompargrado, kiel tre delikatan materion, kaj sin mem konsideri kiel laboristojn komisiitajn por modeli tiun materion; ne forgesante ke ĝi portas en si mem la plejmultajn el la elementoj necesaj por sia perfektiĝado, ke oni devas antaŭ ĉio ne malhelpi la agadon de tiuj naturinklinoj, kaj poste kun granda mezurateco provi ilin helpi.

Oni ne prilaboras oron kaj juvelojn, nerigardante, per pied- aŭ pugnobatoj. Oni uzas lenson, grifelon, polurilon; oni spertiĝas per longa faklernado.

Estas nekompreneble pli malfacile prilabori la homestaĵon. Ĝi estas arto, tuj unue postulanta la respekton al la materio, kiun oni havas en manoj.

(El la Bulteno de la Ferrer'a Lernejo.)
El franca lingvo trad.

# La batalo pro la ĉiutaga pano.

De R. Rocker.

(Tradukis L. Heinrichs, M.-Gladbach.)

III.

Koncerne la duan aserton, sekve de kiu plibonigo de l'proletaria vivstato interne de l'hodiaŭa socio entute ne estas ebla, ĉar ĉiu plialtiĝo de l'salajroj nepre devus sekvigi plialtigon de l'prezoj kaj aliflanke la entreprenistaro estus devigata pagi al la laboristoj tiom da salajroj kiom ili nepre bezonas por kontentigi siajn vivbezonojn — mi asertas, ke ankaŭ ĉi-tiu supozo ege kontrastas la spertitan praktikan realecon.

Ĉi-tiu koncepto, kiu hodiaŭ ree ludas rolon en rondoj da t. n. "radikaluloj" estas nenio alia ol parta renaskiĝo de l'malnova — per la faktoj de l'vivo jam delonge refutita — teorio pri l' "fera salajrleĝo", kiu kiel nerefutebla vero ŝvebis antaŭ l'okuloj de Lassalle kaj liaj anoj. En la "Malferma Respondletero" Lassalle definis ĉi-tiun fiktive ekonomian leĝon laŭjene:

„La fera ekonomia leĝo, kiu laŭ l'hodiaŭaj cirkonstancaj sub prezento kaj postulo de laboro definas la laborsalajron, estas, ke la meza laborsalajro ĉiam restas reduktata laŭ la grado de l'necesa vivteno, kiu en popolo laŭkutime estas bezonata por sekurigi la ekziston kaj por la generado. Jen la punkto, ĉirkaŭ kiu la vera potaga salajro ĉiam pendole balancas, sen iam ajn povi longe aŭ superi aŭ malsuperi ĝin. Ĝi ne povas daŭre superi la mezpunktan bazon, ĉar tiukaze la plibonigita proletaria vivstato devus sekvigi pliigon de l'laboristaj geedziĝoj kaj generado kaj sekve de tio pliigon de l'prezento da labormanoj, kiu estus reniveliganta la laborsalajron sur kaj sub l'antaŭan bazon. La laborsalajro ankaŭ ne povas daŭre malsuperi ĉi-tiun nivelon, ĉar tia stato sekvigus elmigradon, senedzecon, naskostrikojn kaj fine kaŭzitan de mizero malpliigon de l'laboristaro kaj sekve malpliigon de l'prezento da labormanoj, kiu estus reniveliganta la laborsalajron laŭ la antaŭa bazo. Sekve la vera meza laborsalajro konstante devas pendolsvingante ĉirkaŭumi tiun ĝian mezpunkton troviĝante jen iomete super ĝi (periodo de l'prosperado en ĉiuj laborbranĉoj) jen iomete sub ĝi (periodo de l' pli-malpli ĝenerala mizero kaj de l'krizoj). La limigo de l' meza laborsalajro laŭ bazo de necesa vivstato laŭkutime bezonata en popolo por sekurigi la ekziston kaj por la generado — jen estas — mi ripetas tion — la fera kaj kruela leĝo, kiu regas la laborsalajron laŭ la hodiaŭaj cirkonstancoj. Mi povus citi tiom multe da garantiantoj por ĝi kiom ekzistas da nomoj eminentaj kaj famaj en la naci-ekonomia scienco kaj nome eĉ el la liberala lernejo, ĉar ĝuste la liberala ekonomia lernejo ekkonis kaj pruvis ĉi-leĝon." — — —

Oni komprenas, ke Lassalle havanta tiam koncepton ne povis esti amiko de l'sindikata organizado de l'laboristaro, ke li male devis vidi en ĝi rektan malhelpaĵon por la prospera evoluo de l'nova partio fondita de li. Kaj fakte, se oni konvinkas, ke l'problemo pri laborsalajro kaj proletaria vivstato estas destinata de neŝanĝebla ekonomia leĝo — kian celon tiukaze la sindikatoj havas — kian celon tiukaze ĉiu batalo de l'laboristoj pro plibonigo de ilia ekonomistato havas?

Tial estis nur kompreneble, ke Lassalle malaprobis ĉian signifon de l'strikoj kaj dum 1862-j — kiam la Berlin-aj libropresistoj postulis ĉe l'Prusa ministraro la koalicirajton por povi eniri salajrbatalojn — eĉ rifuzis ĉian partoprenon de l' "Ĝenerala Laborista Unuiĝo" je ĉi-tiuj klopodoj, motivante tion: "ke l'koalicirajto povas alporti al la laboristoj nenian utilon". Kaj estis nur kompreneble, ke la Lassalle-anoj komence tute malamike rilatis al la sindikatoj kaj dum 1872-j ankoraŭ laŭ propono de Tölcke decidis disigi la tiam ekzistantajn sindikatojn starantajn sub ilia influo.

Kaj tamen ĉiu (objektiva senantaŭjuĝa) observanto, kiu ne estis barinta al si dekomence la perspektivon per arbitraj supozoj, devis diri, ke la ĝusteco de tiu-ci fiktive "fera" leĝo ne estas nedubebla. La nura fakto, ke la laboristoj konstante estas devigataj kolektivpotence kontraŭbatali la formadon de la t. n. salajrcirkonstancoj por akiri pli bonajn laborprezojn kaj pli mallongan labortempon, jam liveras la pruvon, ke la t. n. fera salajrleĝo *ne* agas kvazaŭ neŝanĝebla ekonomia fatalo — sed ke la homoj konstante devas fuŝi ĝian agadon.

La laboristo certe ne strikas pro sia plezuro; male — plej ofte la strikoj por li estas interligataj kun arego da materiaj suferoj kaj neantaŭviditaj konsekvencoj, kiuj vere ne faciligas lian bataldecidon. Ĉiu, kiu iam partoprenis la laboristajn ekonomibatalojn, proprasperte scias, kiom da energio, agado kaj klerigo estas necesa flanke de l'celkonscia malplimulto por iniciati la plimulton al batalo. Kaj ĉi-tiu ega nelacigebla laborado kaj la ankoraŭ pli penega organizado estus tutplene superfluaj, se ni vere havus antaŭ ni la efikon de fera leĝo, kiun kontraŭbatali estas tute sensukcese. En vero ĉi-tiu t. n. "fera salajrleĝo" estas ne pli ol multe da aliaj ekonomiaj leĝoj, kiuj estiĝis nur en la imagforto de l'homoj kaj kies sola efiko konsistas en tio, ke ili lamigas la agadforton de ti-kiuj kredas al ili.

Same kiel la ekonomiaj batalorganizaĵoj laboristaj ankaŭ la ĉiutagaj salajrbataloj rezultas el la kapitalisma ekonomiordo kaj la vastaj labormasoj bezonas ilin tiom ke ili devus droni en abismo da mizerego, se ili iam volus rezigni je ili ti-kiom longe ili troviĝas en la jugo de l'salajrsklaveco. Kiu tion ĝis hodiaŭ ne ankoraŭ komprenis, tiu vere ne havas kaŭzon fieri pri sia fiktiva "radikalismo", ĉar li malgraŭ sia revoluciismo estas ne pli ol nedanĝera filistro, por kiu la pli profunda esenco de l'laborista movado restis kaŝata ĝis hodiaŭ.

Per salajrbataloj la sociala demando certe ne estas solvebla, sed ili estas plej bonaj lecionoj por konatigi la laboristojn kun la sociala demando kaj la problemo pri ilia liberiĝo el ekonomia kaj sociala sklaveco — kaj maturigi ilin por la finbatalo. Povas esti ankaŭ ĝuste, ke la laboristo ti-kiom longe li estas devigata vendi cerbon kaj manojn al entreprenisto — alivorte: ti-kiom longe li estas salajrsklavo (krom kelkaj esceptoj, kiuj nur atestas la regulon) neniam povas perlabori pli ol li bezonas por kontentigi siajn necesajn vivbezonojn. Sed ĉi-tiuj vivbezonoj ne estas konstante samaj, ili plivere estas subigataj al konstanta ŝanĝo kaj kreskas proporcie kun la postuloj kiujn la laboristoj pretendas de l'vivo.

Kiu ekz. riskas aserti ke la vivstato de l'proletario vivinta dum la komenc-kapitalisma periodo estis samti-kia de l'hodiaŭa laboristo? Krom pure materiajn pretendojn la moderna laboristo havas aregon da kulturaj bezonoj, pri kiuj lia antaŭulo vivinta antaŭ jarcento eĉ ne revis. Por kontentigi ĉi tiujn bezonojn li konstante devas bataladi por havigi al si la rimedojn por povi plibonigi sian fizikan kaj spiritan vivstaton. Kaj ĝuste ĉi-tiuj bataladoj estis kaj estas donantaj al la moderna laborista movado ĝian apartecan signifon, kiu diferencas ĝin de ĉiuj aliaj movadoj pasintaj.

Oni de diru, ke ni ne povas paroli pri plibonigo de l'proletaria vivstato, ĉar eĉ la sklavo vivinta dum la antikveco kaj la gildano vivinta dum la pasintaj jarcentoj estis havantaj pli bonan ekonomian vivstaton ol la hodiaŭa salajrlaboristo — ke ilia ekonomia ekzisto estis sekurigata multe pli bone — kaj ke sekve nur plimalboniĝo de l'proletaria vivstato estas konstatebla. Se oni volas ĝuste kompari por konstati, ĉu la ĝenerala vivstato pliboniĝis aŭ plimalboniĝis — tio estas ebla nur se oni limigas la komparojn laŭ certa socia periodo kaj ne intermiksas aĵojn, por kies estiĝo plej diversaj antaŭkondiĉoj kunagis. Do, ni povas prijuĝi ĝuste la rezultojn el la konstanta batalado de l'moderna industri-proletariaro nur se ni limigas la komparojn laŭ l'kadro de l'moderna kapitalisma sistemo, ĉar ĉiu alia komparo devas konduki al trompaj konkludoj.

Kaj nun oni legu la mallumajn priskribojn pri l'ĝeneralaj vivkondiĉoj de l'laboristaro vivinta dum la frukapitalisma periodo, kiuj estas troveblaj en la raportoj de l'anglaj fabrikinspektoroj kaj kiujn Marx tiel bone sciis uzi en lia "Kapitalo". Aŭ oni legu aliajn librojn, ekz.: Buret: "Pri la mizero de l'laborklasoj en Anglio kaj Francio" (De la misère des classes laborieuses en Angleterre et en France), al kiu Friedr. Engels dankis tiom multe skribante sian unuan verkon: "La stato de l'laborklasoj en Anglio" — kaj oni lernos ĝuste kompreni la teruran mizeregon de l'proletariaro tiutempa. Se la anglo Arthur Young en la konata priskribo de sia vojaĝado tra Francio antaŭ eksplodo de l'granda revolucio diris, ke oni vastajn partojn de l'franca kamparanaro povas kompari nur kun bestoj, al kiuj pro ilia troega mizero mankas ĉia homeco, do oni certe ne troigas same taksante vastajn masojn de l'industri-proletariaro vivinta dum la komenca periodo de l'kapitalisma evoluo.

Ega plimulto de l'laboristaro vivadis en mizeraj kavernoj kaj devis servuti 14—15 horojn potage en la pundomo de l'industrio, kie nenia higiena aranĝo zorgis pri vivo kaj sanstato de l'ekspluatataj. Kaj tion por salajro, kiu apenaŭ sufiĉis por kontentigi la plej primitivajn vivbezonojn. Se la tiutempa laboristo fine de l'semajno restigis tiom por povi aĉeti por kelke da horoj paradizon en alkoholebrieco, do per tio li atingis la plejan altecon, kiun li entute povis atingi. Kaj fine

oni legu ti-kion tiutempaj aŭtoroj scias raporti pri l'morala degenerado kaj l'spirita malbonstato de tiuj malfeliĉuloj. La haroj leviĝas, se oni legas tiujn priskribojn, kiuj hodiaŭ ŝajnas esti preskaŭ nekredeblaj. Kaj ĉi-tiu kruela ekspluatado ne estis limigata je l'viroj kaj l'virinoj de l'proletariaro, ĝi ankaŭ ne indulgis la proletariajn infanojn, kies mortkvanto pliigis laŭ tia grado, ke Richard Carlile k. a. rajte parolis pri kruela ripeto de l'Betlehema infanmortigo taŭ pli granda mezuro.

Kaj samti-kia en Anglio la stato estis ĉie kie la kapitalismo evoluis kiel sistemo. Jardekoj forpasis antaŭ ol la laboristoj per helpo de siaj ekonomiaj organizaĵoj entute sukcesis akiri iompostioman leviĝon de ilia ĝenerala vivstato. La plej bagatelan plibonigon ili dum senĉesa batalado devis elŝiri el la ungegoj de l'ekspluatistaro. Nek leĝo nek registaro helpis la laboristojn, ili batalante devis havigi al si ĉiujn ĝis nun akiritajn rajtojn oferante multege dum tiu batalado. Eĉ ti-kie la leĝdonantaj korporacioj aŭ registaraj organaj vidis sin devigataj pro l'premego de ekstere, leĝe sankcii certajn plibonigojn, la laboristoj ne povis senĝene ĝoji pri tiuj-ĉi akiraĵoj, ĉar la potencavida entreprenistaro eluzis ĉian rimedon por nuligi la plibonigojn eĉ se ili estis leĝe sankciitaj de l'registaroj.

Certe la laboristo ankaŭ hodiaŭ ankoraŭ estas subigata al ĉiuj krizoj kaj ŝanĝoj de l'kapitalisma sistemo; kaj la sociala mizero ankoraŭ ĉiam estas unu el la plej karakteraj apudaĵoj de l' nuna socio. Tiu-ĉi stato restos la sama ĝis ti-kiam la malbeninda sistemo de ekspluatado de l'homo per la homo ĉesos ekzisti. Sed tamen estus falsa la aserto, ke la vivstato de l'hodiaŭa laboristo ankoraŭ ĉiam estas samti-kia de lia antaŭulo vivinta dum la komenca periodo de l'kapitalismo. Nur sencenca sofismo povis provi pruvi tiun aserton.

Jes, estas diferenco, se homo devas servuti 8—9 anstataŭ 13—14 horojn potage. Jes estas diferenco se mia salajro apenaŭ sufiĉas por kontentigi la plej necesajn bezonojn de mia materia ekzistado anstataŭ ke mi povas restigi ti-kiom mi bezonas por havigi al mi certan eblecon perfektigi ankaŭ mian spiritan kaj moralan homon. La hodiaŭa laboristo ne aregon da bezonoj, kiuj al lia antaŭulo estis absolute nekonataj. Hodiaŭ en vastaj rondoj laboristaj oni scias taksi la valoron kaj posedon de bona libro. Oni sentas la bezonon viziti tiam kaj tiam teatron aŭ koncerton, aŭ ĝui aliajn kulturajn akiraĵojn. Tiaj bezonoj jam hodiaŭ enpenetris la karnon kaj sangon de milionoj da proletarioj kaj kategorie postulas kontentiĝon. Tial estas nur kompreneble, ke l'laboristo kuniĝas kun samcelanoj por havigi al si materian eblecon por ĉi tiu kontentigo. Ĉi tiu senĉesa batalado pro la kontentigo de pli altaj vivpretendoj estas unu el la plej gravaj flankoj de l'moderna laborista movado. Se ĉi-tio ne estus tiele, la tuta movado kaj ĉiuj sennombraj bataladoj de l'laboristaro kontraŭ l'entreprenistaro por plibonigi ĝian vivstaton entute estus sencelaj. Nur malsaĝulo aŭ homo, kiu tute mondfremde rilatas al la vivo, povus riski tian aserton.

Jen ni atingis la problemon pri l'ĝenerala kultura signifo de l'laboristaj organizaĵoj kaj ilia konstanta batalado kontraŭ la portantoj de l'kapitalisma sociordo. La ekonomia unuiĝo de l'produktantoj por la proletario ne nur estas rimedo por akiri pli bonajn nateriajn vivkondiĉojn; ĝi samtempe fariĝas lia praktika lernejo kaj edukejo, kie instruado kaj klerigo estas donataj riĉmezure al li. La praktikaj spertoj kaj rezultoj de lia ĉiutaga batalado en la organizaĵoj laboristaj trovas ilian spiritan eĥon; ili pliprofundigas lian internan ekkonon kaj plilarĝigas lian spiritan perspektivon. Per tia konstanta spirita konsumado de l'gajnitaj vivspertoj novaj bezonoj kaj iniciatoj evoluiĝas laŭ la plej diversaj postuloj de l'spirita vivo. Tiamaniere ĉe milionoj da laboristoj deziroj plialtecaj vekiĝas, pri kiuj la proletario vivinta dum pasintaj periodoj ne havis eĉ la plej etan komprenon kaj en ĉi-tiu evoluado de l'aferoj troviĝas unu el la plej valoraj akiraĵoj de l'proletaria batalado kontraŭ l'kapitalklaso. Sed la laboristoj havigis al si ankaŭ ĉi tiujn akiraĵojn kiujn ni ne povas taksi sufiĉe altvalore, nur dank' al sia propra iniciativo kaj dank' al la organiza unuiĝo kun samcelanoj. Per la iniciativo de l'posedantaj klasoj ili certe neniam estus sukcesintaj pliriĉigi sian spiritan vivenhavon.

Oni ne kontraŭdiru, ke sekve de l'riĉa spirita kulturo de l'burĝa periodo estus neevitable, ke parto de ĉi kulturvaloraĵoj devis utili ankaŭ al la laboristoj, sendepende de l'ekzisto kaj inspiranta influo de l'laboristaj organizaĵoj. Fakte oni asertis tion. Sed, ĉiu periodo ja havis sian apartan spiritan kulturon, kio tamen ne jam liveras la pruvon, ke l'nura ekzisto de tia kulturo devas sekvigi, ke ankaŭ la pli malsupraj tavoloj de l'socio povas ĝui ĝin laŭ certa grado. Kiu ekz. povus aserti, ke la spirita kaj arta kulturoj de l'rokokoperiodo iele estus utilintaj al la pli malsuperaj tavoloj de l'popolo nome al la vastaj masoj de l'kamparana servutularo.

Certa spirita kulturo kaj la bezono ĝui kulturaĵojn de l'vivo ĉiam estas eblaj nur ti-kiam popolo aŭ pli bone dirata: sociklaso estas akirinta certan materian vivstaton, kiu kapabligas ĝin kontentigi spiritajn kaj kulturajn bezonojn. Sen ĉi-supozo evoluo de spiritaj kaj kulturaj bezonoj entute estus neebla. Homoj konstante minacataj droni en abismo da mizerego kaj posedantaj eĉ ne ti-kiom ili bezonas por kontentigi la plej necesajn bezonojn de l'materia vivo, regule ne interesas pri spiritaj kulturvaloraĵoj. Tial ankaŭ oni ne povas paroli pri tiaj bezonoj de l'proletariaj vivintaj dum la komenc-kapitalisma periodo, ĉar tiuj bezonoj povis evolui nur ti-kiam la laboristaro post jardeklonga batalado kontraŭ la entreprenistaro estis sukcesinta plibonigi sian materian vivstaton. Nur tio povis ebligi disfaldiĝon de spiritaj kaj ĝeneralaj kulturaj bezonoj interne de l'laboristaro.

La entreprenistaro ne estis akcelanta ĉi-tiujn spiritajn klopodojn de l'laboristaro. Male, ĝi ĉiam persekutadis ilin malkonfideme kaj eluzis ĉian rimedon por malebligi ilin. Ĝis hodiaŭ la kapitalisto eluzis ĉian rimedon por premigi la vivstaton laboristan sur pli malaltan nivelon kaj li ne demandis eĉ la diablon, ĉu per ĉi-tiu sia bruteca agmaniero la klopodoj de l'kleriĝema laboristaro estas limigataj au eĉ tute malebligataj. La kapitalklaso ĉiam ankoraŭ konas la parolojn de l'hispana ministro Juan Bravo Murillo: "Ni en Hispanio ne bezonas penskapablajn homojn, ni nur bezonas laborbestojn."

Do estas nerefuteble, ke l'laboristaro konstante batalante kontraŭ l'entreprenistaro estis akirinta pli bonajn vivkondiĉojn, kiuj ne nur limiĝas je nura plialtiĝo de l'pure materia vivstato sed akcelis kaj evoluigis esence ankaŭ l'bezonojn pri spiritaj kaj ĝeneralaj kulturvaloraĵoj. Nun oni ja povus kontraŭdiri, ke ĉi-tiuj etaj akiraĵoj havas preskaŭ nenian valoron kompare kun la socialisma fincelo de l'revolucia laborista movado. Fakte arego da t. n. "radikaluloj" ekzistas, kiuj, deirante de tia percepto, rifuzas ĉiun provon plibonigi la proletarian vivstaton interne de l'hodiaŭa socio kiel senesperan kaj "reformisman" — kaj nur parolas pri batalo "pro l'tuto", kompreneble restante ĉiam nur paroladante.

Se oni nur abstrakte rigardas l'aferojn kaj tute malatentas la veran realecon — jes — tiukaze ĉiuj bataloj de l'laboristaro pro praktikaj plibonigoj ŝajnas esti sencelaj. Fakte, kian valoron ĉiuj plibonigoj akiritaj dum jardeklonga konstanta kaj nelaciĝema batalado havas kompare kun la idealoj pri socialisma estonteco? Sed tia nur abstrakta rigardo jam kaŭzis multe da konfuzo. Oni troege malatentas la malmolan realecon de l'vivo kaj anstataŭas la firman volon batalante akiri ŝanĝojn per piecaj deziroj kaj sofisma ŝaŭmado, malantaŭ kiuj sin kaŝas nenia klara penso. Oni — rigardante el la aerperspektivo de la "pura principo" — ignoru kaj plietigu kiel sensignifajn la praktikajn akiraĵojn de l'proletaria batalado; por la unuopa proletario ili tamen multe valoras.

Demandu la proletarion mem, tiun viron kiu ĉiutage penege servutante devas labori aŭ en fabrikejo, aŭ en minejo, aŭ sur kampo aŭ en fandejo por gajni la mizerajn rimedojn por vivi — demandu lin, kiun valoron ĉi tiuj etaj plibonigoj havas por li kaj lia familio. Provu klarigi al li, ke verdire estas sensignife, ĉu li servutas 8 anstataŭ ol 12 horojn potage, ĉar li ja tamen ambaŭkaze restas salajrsklavo.

Aŭ klarigu al virino el la popolo, kiu devas kontentigi la familiajn bezonojn per la salajro, kiun ŝia edzo sabate alportas hejmen — klarigu al ŝi, ke verdire estas sensignife, ke la salajro apenaŭ sufiĉas por aĉeti nur sekan panon kaj terpomojn (ni ja dum la inflacia periodo konstatis kaj bedaŭrinde hodiaŭ ankoraŭ ĉiutage devas konstati tion) — anstataŭ ke restas ti-kiom necesas por kontentigi ankaŭ aliajn bezonojn. Klarigu al ŝi, ke ŝi tute povas indiferenti pri ĉi-tiuj aferoj, ĉar ja tial la ekzisto de l'kapitalisma socio ne estus endanĝerigata. Provu klarigi al ŝi tion, kaj tiu simpla virino el la popolo pro via saĝeco nur levos la ŝultrojn kaj nomos vin cerbdifektaj malsaĝuloj.

Ĉi-tiuj etaj pliboniĝoj aŭ plimalboniĝoj de l'proletaria vivstato por la unuopa laborista familio havas eminentan valoron; kaj oni fakte devas esti blinda, se oni volas ignori ĉi-fakton. Ĉar finfine la laboristo — ankaŭ la plej radikala socialisto kaj revoluciulo — tamen vivas interne de l'hodiaŭa socio, kies limon li ne povas transiri. Lia ĉiutaga laborado estas lia esenca vivenhavo — la materia bazo de lia individua

kaj socia ekzisto, de kiu ĉiu alia lia okupo estas pli-malpli destinata. Sekve li ne povas indiferenti pri aferoj plej intime ligataj kun lia persona ekzisto.

Kiu scias rakonti al la laboristoj nur pri l'granda fincelo kaj cetere provas kredigi ilin, ke ĉiu plibonigo interne de l'hodiaŭa socio por ili estas sencela, eĉ neebla, tiu malgraŭ sia fiktiva "radikalismo" ne agas pli bone ol la pastraĉoj, kiuj promesas al la malsatantoj ĉielan paradizon, por ke ili pli facile forgesu pri l'infero de ilia surtera vivo. Kio alia do estas la konstanta laŭdado ankaŭ pri l'plej bona idealo, se oni samtempe forgesas pri l'hodiaŭaj taskoj de l'ĉiutaga batalado kaj provas konvinki la laboriston, ke ĉi-batalado por li havas nenian valoron.

Se oni volas konvinkiĝi pri l'fakto, ke tamen diferenco ekzistas en la proletaria vivstato, tiukaze cetere ne necesas observi porekzemple la vivstaton de l'proletarioj vivintaj dum la komenc-kapitalisma periodo. Sufiĉas plene, se oni rigardas pli precize la spertojn de l'germana laboristaro kolektitajn dum la lastaj jaroj kaj komparas ilin kun la antaŭmilita vivstato.

Porekzemple antaŭ kelkaj monatoj aperis verketo de Fritz Reuter, kiu pritraktas la eksporteblecojn de l'germana maŝinindustrio. Ĉi-verketo enhavas ankaŭ statistikan tabelon komparantan la salajrojn pagitajn dum la lastaj jaroj en la angla kaj la germana metalindustrioj. La tuta senekzempla tragedio de l'germana laborklaso kaŝas sin malantaŭ ĉi-tiuj sekaj ciferoj. Antaŭ l'milito la minimuma salajro de l'germana metallaboristo estis ĉ. 70 germ. pf. pohore — dume la angla metallaboristo salajris 83 pf. pohore — sekve li salajris 20% pli ol lia germana kolego.

Pri l'posta formiĝo de ĉi-tiuj rilatoj jena tabelo raportu:

| | | *Germanio* | | *Anglio* | |
|---|---|---|---|---|---|
| | | or - pfg. pohore | % de l' antaŭmilita salajro | or - pfg. pohore | % de l' antaŭmilita salajro |
| 1922 | 30 Janr. | 25 | 37 | 137 | 165 |
| | 6. Marto | 18,4 | 26 | 139 | 168 |
| | 1. Majo | 29,15 | 41,5 | 136 | 164 |
| | 31. Julio | 17,73 | 25,4 | 138 | 166 |
| | 23. Oktbr. | 11,2 | 16 | 133 | 160 |
| | 20. Novbr. | 9,5 | 13,55 | 136 | 164 |
| | 4. Decbr. | 13,5 | 19,6 | 139 | 168 |
| 1923 | 29 Janr. | 8,2 | 11,7 | 141 | 170 |
| | 5. Marto | 25,5 | 36,5 | 141 | 170 |
| | 14. Majo | 14 | 20 | 134 | 161,5 |
| | 4. Junio | 9,6 | 13,7 | 131 | 158 |
| | 2. Julio | 22,86 | 32,7 | 132 | 159 |
| | 24 Septbr | 52,63 | 75,2 | 134 | 161,5 |
| | 1. Oktbr. | 35,7 | 51 | 135 | 163 |
| | 5. Novbr. | 52 | 74,3 | 134 | 161,5 |
| | 31 Decbr. | 48 | 68,5 | 131 | 158 |
| 1924 | 14. Janr. | 48 | 68,5 | 131 | 158 |

La angla metallaboristo salajrinta antaŭ l'milito 20% pli ol lia germana kolego hodiaŭ salajras preskaŭ trioblon. Sed — dum l'inflacia periodo li ofte salajris 10- kaj eĉ 15-oble pli ol la germana metallaboristo. Kaj nun oni asertu, ke esencaj diferencoj en la proletaria vivstato ne ekzistas!

En la karbindustrio la diferencoj ne estas samtiaj egaj — sed sufiĉe alarmantaj. Laŭ l'lasta statistiko la minimuma salajro de l'angla ministo estas preskaŭ 11 ŝil. potage t. e. preskaŭ duoblo de l'salajro, kiun la germana ministo ricevas. Samtia estas la stato en multe da aliaj industrioj. Do estas nedubebla fakto, ke l'ĝenerala vivstato de l'germana laboristo plimalboniĝis laŭ teruriga grado. Se oni cetere konsideras ke l'prezoj por la plej necesaj vivrimedoj (manĝaĵo ktp.) ege superas l'antaŭmilitajn prezojn, ke ĉiutagaj bezonaĵoj kiel vestaĵoj ŝuoj, tolaĵoj ktp. eĉ estas preskaŭ nepageblaj, oni nur pli malhume kolorigas la bildon pri l'vivstato de l'germana laboristo. Kaj se oni fine ankoraŭ konsideras, ke l'germana popolenspezo estas ŝarĝata per impostoj ktp. je 46% po kapo de l'enloĝantaro (dume en Francio nur je 22% kaj en Anglio nur je 18%), ke la posedantaj klasoj eluzas ĉian rimedon por ĵeti plejeble multe da ĉi-ŝarĝo sur la ŝultrojn de l'germana laborklaso, jen oni devas ĝuste kompreni la postmilitan suferojon de l'germana laboristaro.

Eĉ la malfruaj reprezentantoj de Lassalle-a salajrleĝo (se ili havas iometan bonvolon) devas konstati el tio, ke l'problemo pri l'vivstato ne estas tiel senesenca por la laboristaro kiel ili kredas — kaj ke al tiu fiktiva "leĝo" mankas ĉiu pli profunda motivo.

Kaj ni ne forgesu, ke ĉi-tiu terura plimalboniĝo de l'proletaria vivstato okazis ti-kiam la germana metalindustrio sub estreco de Stinnes enpoŝigis fabelecajn profitojn kaj kiam niaj grandagraruloj "malgraŭ plenaj garbejoj lasis malsati" l'germanan popolon. Sed socialdemokratia saĝeco kaj centrunuiĝa kadukeco samtempe provis kredigi la laboristojn, ke post malgajnita milito oni devus deteni sin de salajrpostuloj, se oni ne volus plene ruinigi l'germanan ekonomivivon. Kaj la laboristoj estis sufiĉe malsaĝaj kredi al tiaj suflorajoj, dume entreprenistoj, agraruloj koj borsspekulaciistoj plenigis siajn poŝojn. Tiuj s-roj ne estis turmentataj de iaj skrupuloj; pro la malgajnita milito ili tute ne pensis kontentiĝi je pli etaj profitoj, male ili englutis ĉion kapteblan, dume la laboranta popolo apenaŭ povis nutri sin per seka pano kaj terpomoj. Neniu el ĉi-tiuj parazitoj pripensis eĉ dum unu minuto, ke ilia absurda manĝegemo fordonas tutan popolon al sensava pereo.

Fakto estas, ke granda parto de l'hodiaŭaj prezoj tute ne kompareblaj kun la mezaj laborsalajroj entute ne estas klarigeblaj per ekonomiaj kaŭzoj — sed nur psikologie. Dum normalaj periodoj la entreprenisto kaj l'komercisto kontentiĝas je certa profito, kies alteco estas regulata grandparte de l'reciproka konkuro. Tiamaniere inter la komercistaro eĉ certa etiko evoluas, kiu bone scias diferenci t. n. honestan komercadon kaj rektan profitemon. Sed dum la postmilitaj jaroj kaj precipe dum la t. n. inflacia periodo ĉiaj etikaj ideoj kaj ĉia laŭnatura mezuro rompiĝis. La "lasu fari, lasu iri!" de l'posedantoj perdiĝis en senlimaĵon. Ĉiu entreprenisto, ĉiu komercisto samtempe fariĝis spekulacianto, spekulacianto je l'senlima mizerego de siaj sampopolanoj kaj enpoŝigis profitojn, pri kiaj ili antaŭe eĉ ne riskis revi. *Raffke*[1]) *fariĝis atuto en Germanio*, la ŝovisto[1]) okupis la lokon de l'iama komercisto. Oni ne povas miri, se multe da ĉi tiuj S-roj hodiaŭ nun malfacile povas ree kutimiĝi al la periodo de t. n. stabileco. La prezoj elokvente atestas tion.

Koncerne la aserton, ke ĉiu plialtigo de l'salajroj nepre devas sekvigi plialtigon de l'prezoj kaj ke la kapitalisto ti-kion li unumane pli pagas al la produktanto alimane reŝtelas el la poŝo de l'konsumanto — aserto kiun oni hodiaŭ ree fervore kolportas en rondoj da t. n. "radikaluloj" — ĝi estas samtiel erara kiel la "fera salajrleĝo". Neniu alia ol Marx proprapersone (pri kiu multe da niaj "radikaluloj" konstante paroladas) konvinkige pruvis la falsecon de ĉi-aserto. En lia konata parolado en la Ĝeneralkonsilantaro de l'Internacio (1865 j) li dispecigis la paroladon de l'Oven-ano Weston, kiu prezentis la saman opinion, tiel fundamente, ke de ĝi restis eĉ nenio.

Fakte, tiu aserto povus pretendi certan verŝajnecon nur se (laŭ diro de Marx) oni povus pruvi: "1. ke l'kvanto de l'nacia produktado estas io fiksa — samrestanta kvanto aŭ grandeco (kiel dirus la matematikulo); 2. ke l'sumo de l'realaj salajroj t. e.: de tiuj salajroj mezurataj laŭ l'kvanto de l'vivbezonaĵoj aĉeteblaj per ili estas fiksa sumo, samrestanta alteco."

Tiukaze oni povus trovi almenaŭ komprenebla la aserton. Sed nun ni scias, ke l'ĝenerala produktado konstante plikvantiĝas kaj ke per tio sola la entreprenisto jam eblas ree egaligi plialtigojn de l'salajroj sen ke li estus devigata plialtigi ankaŭ l'prezojn.

Se vere estus ekonomia fakto, ke plialtigo de l'salajroj nepre devas sekvigi plialtigon de l'prezoj, do sekve de ĉi-fakto ŝanĝo de l'proletaria vivstato vere estus neebla. Sed tiukaze la moderna laboristo ĉiam ankoraŭ devus vivi laŭ l'samaj kondiĉoj kiel lia antaŭulo vivinta dum la komenckapitalisma periodo. Kaj ĉar — laŭ ĉi-supra cito — evoluo de spiritaj kaj moralaj bezonoj povas okazi nur se ĝi estas ebligata de pliboniĝo de l'materia vivstato, do ĉiuj fenomenoj konstateblaj ĉiupaŝe interne de l'laborista movado devus bazi sur optikaj iluzioj. Tiukaze — jes — ĉiuj sennombraj bataloj de l'laboristoj kontraŭ l'entreprenistaro por akiri pli bonan vivstaton estus sencelaj. Sed tiukaze ankaŭ ĉiuj provoj de l'entreprenistaro malaltigi ĉiuokaze la salajrojn de l'laboristoj estus samtiaj sencelaj kaj sensignifaj, ĉar ĝi ja neniel povus aliigi la staton de l'aferoj. Sed, la entreprenistaro certe posedas tiom da prudento, ke ĝi ne sencele provokas aferojn, kontraŭ kiuj la laboristoj tuj devas reagi, kaj kiuj sekve kaŭzas konstantan endanĝerigon de l'ekonomivivo, pri kio la kapitalisto absolute ne povas interesi. Tia ago estus ne nur malsaĝa, ĝi estus pleja frenezo.

[1]) *Raffke* = nomo karakterizanta la germanan "ŝoviston", kiu facile kaj rapide riĉiĝis dum la inflacia periodo per "ŝovado" de varoj.

Estas entute absurde kredi, ke la kapitalisto ĉiutempe kapablas plialtigi la prezojn ti-kiam la salajroj ŝanĝiĝis iom je utilo por la laboristoj. Ĉe l'fiksado de l'prezoj tute aliaj faktoroj ludas rolon kaj ankaŭ la kapitalisto tiurilate ne povas agi simple laŭvole, sed lia agpovo plivere estas limigata de certaj kondiĉoj, kiujn li ne povas laŭvole aliigi, kiujn li multfoje eĉ ne povas ignori pro l'konkuro. Se tio ne estus tiele, tiukaze, laŭ ĝusta diro de Marx, "la senĉesa ŝanĝo de l'foirprezoj estus nesolvebla enigmo".

Mi ne povas pritrakti plidetale l'interrilatojn inter salajro kaj prezo, ĉar ja ĉi-skribaĵo havas tute alian celon. Kiu interesas pri ili, tin legu la verketon de Marx[1]), kiu elĉerpige pritraktas ĉi-problemon. La tuta aserto, ke plialtigo de l'salajroj nepre devas sekvigi plialtigon de l'prezoj, estas ne pli ol mistifiko samti-kia multe da aliaj ekonomiaj "leĝoj", kiuj nur kaŭzis konfuzon kaj devojiĝon interne de l'laboristaro.

Jes, estas eble, ke plialtigo de l'salajroj povas sekvigi plialtigon de l'prezoj, sed ankaŭ la malo povas okazi laŭ multe da trafaj ekzemploj cititaj de Marx, pri l'fakto, ke plialtiĝo de l'salajroj kaj plimalaltiĝo de l'prezoj samtempe okazis. Sed ke ankaŭ la malo povas okazi, tion ni en Germanio ja sufiĉe devis sperti je nia propra malutilo dum la lastaj jaroj. Ĉar, kvankam la salajroj eĉ laŭcifere ne atingis la antaŭmilitajn salajrojn, tamen la prezoj eĝe superis la antaŭmilitajn prezojn. Se nun estus ĝusta la aserto, ke plialtigo de l'salajroj aŭtomate devas sekvigi plialtigon de l'prezoj, tiukaze laŭ l'sama logiko post plimalaltiĝo de l'salajroj ankaŭ plimalaltiĝo de l'prezoj devas okazi. La nuna stato en Germanio plej bone pruvas la malon.

Ne, ĉiuj t. n. feraj "leĝoj" ne kapablas forpreni ankaŭ nur joton de la signifo de l'ĉiutaga batalado laboristara, de l'batalo pro la ĉiutaga pano. Ĝi donas al la laborista movado ĝian veran karakteron kaj estas kunkreskiĝinta plej intime kun ĝia plej interna esenco.

Sed ĉi tiu batalado ne nur havas senpere praktikan signifon; ĝi estas ankaŭ necesa supozo por la definitiva liberiĝo de l'proletariaro el la jugo de salajrsklaveco kaj el ĉia alia formo de ekspluatado. Kvankam radikante en la nuntempo kaj en la praktika realeco de l'vivo ĝi tamen portas en si la ĝermojn de estonta vivo, el kiu elkreskos pli bona homa estonteco. Ĉar ĉio *nova* kaj *venanta* elkreskas el la senpera realeco de *l'vivo ekzistanta*. Ne el senaeraj spacoj de abstraktaj imagoj nova mondo estos naskata al ni, ĝi elkreskos el la batalado pro la ĉiutaga pano, el tiu seninterrompo penega lustado postulata de mizero kaj zorgo de *l'Horo* kaj kiu scias kontentigi ĉiujn urĝajn bezonojn. *Dum konstanta batalado kontraŭ l'ekzistanta malnovo la novo formiĝas kaj maturiĝinte perfektiĝos. Kiu ne scias taksi la akirajon de l'Horo, tiu neniam kapablos perbatali pli bonan estontecon por si mem kaj siaj kunvivantoj.*

La ĉiutaga batalado de l'laboristoj kontraŭ entreprenistaro iom post iom plikapabligas ilin ekkoni la pli profundan sencon de ĉi-batalado. Komence ĝi nur senpere celas plibonigi la ĝeneralan staton de l'produktanto interne de l'hodiaŭa socio ĝis kiam ĝi iom post iom malkovras la radikon de l'malbono — la *salajrsistemon* — la kapitalisman monopol-ekonomion. *Por akiri ĉi-ekkonon la ĉiutaga batalado liveras pli taŭgan ilustrivan instruadon ol la plej belaj teoriaj disertacioj. Nenio povas influi la spiriton kaj psikon de l'laboristo tiel forte kiel ĉi tiu senĉesa batalo pro la ĉiutaga pano. Nenio kapabligas lin kompreni la ideologion de l'socialismo ti-kiel ĉi-tiu senĉesa luktado pro la bezonoj de l'vivo.*

Kaj *en tio* finfine la granda sociala signifo de ĉi-batalado troviĝas, kiu devas resti la sama ankaŭ ti-kiam la batalantaj laboristoj malvenkas kaj ŝajne senutile estis malŝparantaj siajn energifortojn. Ankaŭ tiaj malvenkoj estas ege instruaj kaj evoluigas en la cerboj de l'laboristoj la logikan komprenon pri pli bonaj kaj pli efikaj batalmetodoj ankaŭ se la malvenko komence senkuraĝigis ilin kaj ege malakcelis ilian batalvolon.

Kiel la servutuloj dum la periodo de l'feŭda reĝimo per sennombraj ribeloj kaj pli grandaj insurekcioj, kiuj komence nur celis devigi la feŭmulojn doni certajn koncesiojn por plibonigi la mizeran vivstaton — ĝuste per ĉi-tiu seninterrompa ribelado ebenigis la vojon por la granda revolucio kaj antaŭpreparis la forigon de l'feŭdulaj rajtoj — samkiel ankaŭ la sennombraj proletariaj bataloj pro la ĉiutaga pano en la sino de l'kapitalisma socio estas kvazaŭ enirejo por la venonta sociala revolucio, el kiu elkreskos la socialismo. Sen la seninterrompa ribelado de l' servutularo — laŭ raporto de *Taine* de 1781 ĝis la sieĝo de *l'Bastille* pli ol 500 da tiaj revoltoj okazis preskaŭ en ĉiuj partoj de Francio — la ekkono pri la danĝero troviĝanta en servuteco kaj feŭdalismo neniam estus vekiĝinta en la kapoj de l'masoj. Ĉi-ekkono devis maturiĝi nur dum senĉesa batalado kaj iom post iom alpreni vivan formon ĝis kiam ĝi fine potencege ebligis la forigon de la t. n. feudulaj rajtoj.

Samtia estas la signifo de l' ekonomiaj kaj socialaj bataloj de l'moderna laboristaro. Estus absurde, se oni volus taksi ilin nur laŭ ilia materia deveno kaj laŭ iliaj praktikaj rezultoj, kaj tute malatentus ilian egan psikologian signifon por vekigi la masojn kaj plivastigi ilian spiritan horizonton. *Nur dum la ĉiutaga interbatalado inter laboristaro kaj entreprenistaro la ideo pri l'socialismo naskiĝinta en la cerboj de unuopaj pensuloj povis evolui kaj alpreni tiun specialan karakteron, kiu faris el ĝi masmovadon — portanton de nova sociala kulturidealo.*

Ideoj solaj ankoraŭ ne kreas movadon, ili ja mem estas rezulto el konkretaj vivcirkonstancoj, la spirita eĥo de certaj materiaj kondiĉoj. Movadoj elkreskas el senperaj kaj praktikaj necesecoj de l'vivo kaj neniam elrezultas el pure abstrakta imago. Sed ili alprenas nekontraŭstareblan forton kaj internan venkkonscion nur se ili estas fruktigataj de granda ideo, kiu donas al ili enhavon kaj animon. Nur tiusence la interrilato inter laborista movado kaj socialismo estas komprenebla kaj ĝuste taksebla. Sed, se tio estas tiele, do oni el tio devas ekkoni sunklare, ke revoluciaj socialistoj ĉiuspecaj ne povas rifuzi la batalon pro la ĉiutaga pano, kiu ja estas la tutenhavo de l'laborista movado, ke ili devas vidi ĝuste en tiu-ci batalo la neeviteblan antaŭkondiĉon por la fina venko de l'libereca socialismo. *Ĝuste ilia tasko estas partopreni aktive la ĉiutagajn batalojn de l'laboristaro, eluzi ĉiujn rimedojn pliprofundigi kaj pliampleksigi ilin kaj ĉiam ree montri al la masoj, la internan ligitecon inter iliaj postuloj kaj la granda fincelo.*

Kiu kredas, ke li estas tro bona por tiu-ĉi laboro aŭ provas rifuzi ĝin uzante la senvaloran pretekston, ke plibonigi la proletarian vivstaton interne de l'hodiaŭa socio estas neebla kaj nur deflankigas la laboristojn de l'fincelo, tiu ne miru, se li ne estas komprenata de l'proletarioj aŭ se li devas aŭdi, ke oni ne bezonas lian konsilon. La nura fakto, ke li ne komprenis la internan ligitecon inter la batalo pro la ĉiutaga pano kaj la socialisma fincelo de l'movado, pruvas, ke la esencenhavo de l'socialismo kaj ankaŭ de l'laborista movado por li ĝis hodiaŭ restis libro kun sep sigeloj. Li ĝoju pri sia "radikalismo", verdire li estas ne pli ol unu el tiuj malkaraj lunbrilfilozofoj, kiuj ŝvebas transe de spaco kaj kaj tempo kaj ne kapablas kompreni la maldolĉan bezonon de l'vivo.

La novembro-revolucio donacis al ni aregon da tiaj uloj, kiuj preterpasante ludis mallongajn gastrolojn en nia propra kaj parencaj movadoj kaj tiam kaj tiam ankoraŭ hodiaŭ ludas. Plejofte ili estas molaj hibridaj kreitaĵoj, kiuj konstante balancas kiel kano en vento kaj ili neniam scias, kien ili vere apartenas. Ili iomete frandis de ĉiuj partioj kaj partietoj, sed konas nur la fasadon de l'aferoj, ĉar energio mankas al ili fosi pliprofunden por lerni ekkoni l'plejan internon de movado. Ĉar ili lernis kolporti sian saĝecon per la necesa patoso kaj ebriigi nematurajn spiritojn per arego da sensencaj bruaj frazaĉoj, tial la malprudento de unuopuloj gloras ilin kvazaŭ "fortajn virojn" kaj kelkfoje eĉ sekvas ilin ĝis kiam la neevitebla seniluziiĝo alvenas, kiun oni regule ne bezonas longe atendi. Plejofte ili estas traveturintaj perbicikle la tutan nuancaron de l'socialisma movado. Ili estis sendependuloj, komunistoj, bolŝevikoj ktp. ĝis kiam oni iutage retrovas ilin kiel "buddhistoj" aŭ en la agrablaj rondoj da spiritistoj, tablofrapantoj k. t. p. De tie la vojaĝo kutime trairas la "Häusser"-ligon, kie la unu aŭ l'alia iutage ekkonas ke li mem kapablas ludi la rolon de moderna kristo kaj ne plu kontentas ludi la rolon de subula apostolo. Aliuloj fine albordiĝas en trankvila anguleto, kie ili feliĉege kaj gruntante pro plezurego admiras la belecon de sia propa umbiliko. Ni ne volas ĝeni ĉi-tiun ilian ĉarman okupadon kaj nur esperas, ke ankaŭ ili ne plu ĝenu nin.

Sed por la batalanta proletariaro ĉiam ankoraŭ ekzistas la moto: *"Nur batalante vi trovos vian rajton!"* El la batalo pro l'ĉiutaga pano evoluas la sento de l'proletaria solidareco kaj la konscio pri l'homindeco. Nur sur ĉi-tiuj kolonoj estos konstruata la ponto, kiu kondukos la laboristaron for el la infero de l'sociala mizerego kaj industria servuteco en la novlandon de sozialisma estonteco. (Finota.)

[1]) Karl Marx: Lohn, Preis und Profit. — Vereinigung internationaler Verlagsanstalten, G. m. b. H., Berlin. 60 Pf.

# Tra la mondo liberecana.

## Disvolviĝo kaj celoj de ILA.

La revoluciema parto de la internacia laboristmovado, speciale la revoluciemaj sindikalistaj organizaĵoj de ĉiuj landoj, tuj post la milito provis refunkciigi la internaciajn rilatojn, kiujn la milito estis disŝirinta. Reprezentantoj de sindikalistaj organizaĵoj ĉeestis la unuan internacian sindikatkongreson en Amsterdam, 1919, kiam kaj kie fondiĝis la Amsterdam-a Sindikat-Internacio. Sed estis konstate, ke ne eblas interkonsentiĝi kun la socialpatriotoj, kiuj ne longe antaŭ tio estis trumpetantaj al la milito. Ankaŭ la Amsterdam-a Internacio kontraŭbaris al ĉia provo de kunlaboro kun la revoluciaj sindikalistoj akceptante en sin laŭstatute nur unu landan organizaĵon el ĉiu lando. Sed en la plej multaj landoj estis jam depost jardekoj la revoluciema parto de la organizita laboristaro for de la reformema tendaro kaj havis sian propran organizaĵon. La Amsterdam-a Internacio do al la revoluciaj sindikalistoj metis la arogan proponon likvidi siajn proprajn organizaĵojn, kiuj estis la nuraj portantoj de la klasbatala ideo. Ĉar, kompreneble, ne povis esti plenumata ĉi postulo, estis malebligitaj dekomence ĉiuj interrilatoj kun la reformistaj organizaĵoj.

Estis kompreneble aliflanke, ke la revoluciemaj sindikalistoj vidis en la rusa revolucio faktoron kun kiu ili inklinis kunligiĝi. Kiam la Komunista Internacio alvokis la tutan revolucian laboristaron kaj speciale la revoluciemajn sindikalistojn al partopreno ĉe sia IIa kongreso en 1920 j. en Moskvo, tiam estis obeata ĉi voko de diversaj flankoj. Estis reprezentataj ĉe tiu ĉi kongreso la italaj, hispanaj kaj la germanaj sindikalistoj Krom ĉi tiuj memstaraj revoluci-sindikalistaj organizaĵoj ankaŭ ĉeestis reprezentantoj de la revoluciemaj minoritatoj de la reformistaj sindikatorganizaĵoj de Britio, Francio kaj Germanio. Sed cetere ankaŭ ĉeestis oficialaj reprezentantoj de la reformistaj sindikatoj de Italio, la brita laboristdelegitaro kaj kelkaj membroj de IWW de Amerika havintaj tamen neniun mandaton kaj ĉeestantaj nur vizite aŭ rifuĝinte estis en Moskvo.

La rusaj sindikatoj, aniĝintaj ĝis tiam al neniu sindikata internacio, uzis la ĉeestadon de la reprezentantoj de diversaj laboristorganizaĵoj por diskuti kun ili la eblon de formigo de "Ruĝa Sindikat-Internacio". Instigon al tion donis la Komunista Internacio, pli precize dirite: la Komunista partio de Ruslando kaj en ĝis Lenin kaj lia cirklo. Sed ĉi diskutoj seniluziigis la reprezentantojn de la sindikalistoj. Montriĝis, ke ekzistas kontraŭeco inter la percepto de la rusaj sindikatoj kaj tiu de la sindikalistoj. Tamen la sindikalistoj ne volis tuj rompi ĉiujn pontojn de internacia kunligo kun la rusaj sindikatoj. La sindikalistoj de Germanio kaj de Nederlando kunvokis antaŭkonferencon de la revoluciemaj sindikalistoj al Berlin, por mem interkonsenti antaŭ ĉio. Ĉi konferenco okazis decembron 1920an en Berlin. Reprezentataj estis Libera Laborist-Unio de Germanio (FAUD), Nacia Laborist-Sekretario de Nederlando (NAS), Sindikalista Centralorganizaĵo de la svedaj laboristoj (SAC), la Sindikalista Federacio de Norvegio, la komitatoj de la revoluciaj sindikalistoj de Francio, Dok- kaj Kamplaborista Federacio de Argentinio kaj la Industri-Laboristoj de la Mondo (IWW) de Usono. Oni dum ĉi antaŭkonferenco interkonsentis pri komuna bazo de senrezerva klasbatalo kaj tute malaprobis la reĝimon de la kapitalismo kaj de la ŝtato super la spirita kaj ekonomia vivo, kaj pri alcelo de libera komunista socio. Estis akceptataj kiel batalrimedoj la senpera revolucia agado kaj rigardataj la ekonomiaj organizaĵoj kiel portiloj por la akcepto de la produktado kaj distribuado. Estis akcentata, ke devus esti la laborist-internacio sendependa de ĉiu politika partio, sed necesaokaze ĝi povus kunlabori kun aliaj organizaĵoj aŭ partioj je certaj agadoj, entreprenoj. Laste estis alvokataj ĉiuj revoluciemaj sindikalistaj kaj industrialistaj laborist-organizaĵoj sendi delegitojn al la kongreso kunvokita al Moskvo por la jaro 1921 flanke de la provizora konsilantaro de la Ruĝa Sindikata Internacio, por tie formi internacion ampleksontan ĉiujn revoluciemajn laboristojn de la mondo.

La Moskva kongreso okazis en somero 1921a. Estis reprezentataj la plej multaj revoluciaj sindikalistaj organizaĵoj en Moskvo. Tamen ne povis okazi interkonsento inter la rusaj sindikatoj kaj la revoluciaj sindikalistoj de la aliaj landoj, ĉar la rusoj vidis la ĉefon de la revoluciema laboristaro en la komunista partio, al kiu submetiĝu la aliaj sindikatoj. La opinio de la sindikalistoj, fiksita jam je la konferenco en Berlin, estis tia, ke la ekonomiaj organizaĵoj havas la taskon de la klasbatalo kaj de la organizo de la komunisma socio. Ili tial malaprobis la ĉefecon kaj gvidadon de la komunista partio. Ĉar la komunistaj sindikatoj lerte sciis favorigi al si la plimulton de la kongresanaro, tial la sindikalistoj nur povis opozicii. Kaj post reveno de la kongreso kaj post aŭskulto de la raportoj, fakte ĉiuj revoluci-sindikalistaj organizaĵoj, escepte tiu de Francio, deklaris neaniĝon al la fondita en Moskvo Ruĝa Sindikat-Internacio. Jam ĉe la reveno de la sindikalistaj delegitoj el Moskvo montriĝis, pluaj diferencoj kun la Moskva kongreso, kaj je la fino de la 13a kongreso de la germanaj sindikalistoj okazis konferenceto de la reprezentantoj el Nederlando, Germanio, Svedio kaj Usono (IWW). Oni interkonsentis pri okazigo de nova konferenco (en somero 1922) en Berlin. Je ĉi konferenco estis reprezentataj la revolucimaj sindikalistaj organizaĵoj de sekvantaj landoj: Francio, Germanio, Italio, Hispanio, Nederlando, Norvegio, Svedio kaj ĉeestis la reprezentantoj de la rusaj sindikatoj. Krom tio ĉeestis reprezentantoj de la revoluciemaj sindikalistoj, kiuj interne de la rusaj sindikatoj prezentas minoritaton. La diskutatoj kun la oficiala reprezentanto de la rusaj sindikatoj finiĝis je plena disiĝo inter la revoluciemaj sindikalistoj kaj la rusaj sindikalistoj troviĝantaj tute sub regado partia. Nun la sindikalistoj de ĉiuj landoj konstatis, ke interkonsento kun Moskvo ne estas atingebla, kaj unuanime estis akceptata principdeklaro, kiu estas rigardata kiel bazo de la internacia revolucia sindikalismo. La konferenco akceptis rezolucion, en kiu ĝi konstatis, ke Ruĝa Sindikata Internacio ne kapablas de principa vidpunkto nek sur la bazo de siaj statutoj unuigi la revolucian proletariaron de ĉiuj landoj. Pro ĉi kaŭzo oni decidis, aranĝi provizoran oficon de la revoluci-sindikalistoj kaj komisii ĝin kunvoki tutmondan kongreson de la revoluci-sindikalistaj organizaĵoj. La ofico devis komuniki la decidojn de la konferenco al la Ruĝo Sindikat-Internacio, por ke la landaj organizaĵoj aniĝintaj al ĉi internacio havu okazon, partopreni je la menciita tutmonda kongreso, por pretigi la bazon de internacio de ĉiuj revoluciaj kaj sindikalistaj sindikatorganizaĵoj de la mondo. Kiel loko de la provizora ofico estis elektata Berlino.

La Ia internacia kongreso de la revoluciaj sindikalistoj okazis 25an de decembro 1922 ĝis 2a de januaro 1923 en Berlino. Reprezentataj estis *Argentinio* je la Regiona Laborist-Federacio (FORA), *Ĉilio* je Industri-Laboristoj de la Mondo (IWW), *Danio* je la Sindikalista Propagando-Asocio. *Francio* estis reprentata je la Sindikalista Defendo-Komitata, je la Unuigita Konstrulaborista Federacio kaj je la Federacio de la junaj sindikalistoj; *Germanio* je Libera laborist-Unio (FAUD), je Ĝenerala Laborist-Unio, Unuecorganizaĵo (AAUE) kaj je la Anarkiista Sindikalista Junularo. *Hispanio* je la Nacia Laborista Konfederacio, *Meksiko* je la Ĝenerala Sindikata Konfederacio (CGT), *Italio* je la Sindikalista Unio (USI), *Nederlando* je Nacia Laborist-Sekretariaro (NAS), *Norvegio* je la Sindikalista Federacio, *Portugalio* je la Ĝenerala Laborista Konfederacio (CGT),*Svedio* je la Centra Organizaĵo de la svedaj laboristoj (SAC). Je ĉi tiu kongreso la rusaj sindikatoj ne plu estis reprezentataj. ankaŭ la organizaĵoj de aliaj landoj, kiuj dume definitive estis aniĝintaj al RSI, ne ĉeestis la kongreson. La kongreso tial en rezolucio konstatis la nevolon de la rusaj sindikatoj kaj kunligitaj kun ili organizaĵoj de aliaj landoj partopreni la laborojn de l'internacia kongreso de la revoluciemaj sindikalistoj. Ĉi konduto separatema de la gvidistoj de la Ruĝa S.-I. estis neevitebla sekvo de la antisindikalista propagando de Moskvo, kie oni eĉ ne malemis, persekutadi kaj ekzili la plej aktivajn revoluciemajn rusajn sindikalistojn. La tiel nomataj revoluciemaj sindikalistoj aniĝintaj al RSI mem foriris el la sindikalista movado de sia lando kaj iĝis agentoj de la Moskva internacio, kiu celas subigi la sidikalistan movadon de la tuta mondo sub la komunistajn partiojn. Pro ĉi kaŭzo la kongreso konfirmis la decidon de la junia konferenco de 1922 kaj decidis fondi internacion de la revoluciemaj sindikalistoj, kiu havu la nomon:

*Internacia Laborist-Asocio (ILA).*

Je la fino de ĉi tiu jaro ILA ekzistas tri jarojn. La tempo post la fondiĝkongreso estis periodo de organiza konstruado. Dum la sekvanta jaro estis konfirmataj la aniĝoj de sindikalistaj landaj organizaĵoj al ILA parte de kongresoj, parte per referendumoj. Hodiaŭ la revoluciaj sindikat-organizaĵoj de la plej multaj landoj estas aniĝintaj al ILA, kaj tamen ankoraŭ ekzistas multaj landoj, kie ILA ankoraŭ ne trovis bazon. La

periodo post la unua kongreso estis plenigata per la tasko porti la propagandon pri la sindikalismaj ideoj en aliajn tuŝitajn ankoraŭ ne de ili landojn, kaj eĉ hodiaŭ ĉi laboro estas ankoraŭ ne finita. Ĝuste en kelkaj landoj, kie la kapitalismo estas disvolviĝinta plejperfektagrade, ILA havas ankoraŭ ne landajn organizaĵojn. Ĉi landoj estas *Britio* kaj *Usono*. Estas la tasko de la sindikalistoj revoluciemaj disvastigi la ideojn de ILA inter la laboristaron de ĉi tiuj landoj.

Krom la pure agitatecaj taskoj ILA havas ankaŭ aliajn celojn. Ĉi celoj estas fiksitaj de la IIa kongreso de ILA, okazinta en *marto* en *Amsterdam*. Elirante de la principoj de la revolucia sindikalismo ILA devas gvidi la batalojn je du flankoj, nome je la ekonomia kaj je la politika. Ĉe la aliaj internacioj ambaŭ taskoj estas dispartigataj. La politikajn batalojn zorgas la politikaj partiaj internacioj — ĉu socialdemokrata, ĉu komunista — kaj la sindikatajn batalojn zorgas la sindikataj internacioj — ĉu la Amsterdam-a aŭ ĉu tiu de Moskvo. ILA prezentas sintezon de ambaŭ batalmanieroj kaj ĝi celas gvidi kun helpo de la aniĝintaj al ĝi sindikalistaj organizaĵoj la batalon kontraŭ la internacia reakcio per la internacio agado. Samtempe ĝi volas etendigi la batalojn pro pli altaj salajroj kaj pli mallonga labortempo sur internacian kampon. La politiko de ILA celas al konduko de la laborkaj vivkondiĉoj en la neprogresintaj landoj sur la nivelon de tiuj en la plej altevoluitaj landoj. Sed tio ne okazu, kiel ĉe la Amsterdam-a Internacio, per la Internacia Labor-Oficejo kaj per kunlaboro kun la kapitalistaj ŝtatoj, sed per la *revolucia klasbatalo* kaj per la *senpera agado* de la organizita laboristaro.

Ĉikonsidere la IIa kongreso decidis starigi la proksiman postulon pri labortago 6-hora kaj kontraŭbatali ĉiujn klopodojn al plilongigo de la labortempo. Samtempe la industrifederacioj estu kunligataj internacie, ĉar verdire la sindakata klasbatalo nur povas esti gvidata sukcesplene de ĉi internaciaj industrifederacioj.

Tamen la celo de ILA superas la taskojn en la hodiaŭa socio. La internaciaj industrifederacioj ellaboros statistikojn pri la ekzisto de krudmaterialoj kaj pri la produktkapablo de siaj respektivaj industrioj en la diversaj landoj. Kiam foje la klasbataloj de la internacia proletariaro ricevos decidan karakteron, tiam la internaciaj industrifederacioj okupos la lokojn de la modernaj trustoj kaj plenumos la konsumbezonojn de la tuta homaro per la organizita laboristaro. Sed ĉi tutmonda ligo de la laboro neniel estu centralisme organizita de supre al malsupre! La memstareco de ĉiu ajna landa federacio, de ĉiu loka federacio kaj de ĉiu industrisindikato estu ĉefa principo. Tiel Internacia Laborist-Asocio la celadojn de la tutmonda proletariaro efektivigos, libereco kaj bonfarto por ĉiuj en ĉiuj landoj estas garantiataj. *A. Souchy.*

## Raporto pri la kongreso de UA.

*(Franca Anarkiista Unio.)*

(Speciala raporto por LL.)

La 31an de oktobro kaj 1—2an de novembro okazis en Pantin apud Parizo la kongreso de UA.

La demando pri la interna organizado kompreneble ne interesas nian kamaradaron. Sed grava punkto estas la krizo, kiun travivas la anarkiista movado en Francio.

Krom la malakordo, kiu de longe apartigas la t. n. anarkiistojn individualistojn kaj la anarkiistojn komunistojn — malakordo, kiu cetere ne malhelpas al bonaj rilatoj inter la du tendencoj — ekzistas (se tiel oni povas sin esprimi) diversaj subtendencoj. Tiuj tendecoj dispecigas la anarkiistan movadon, kiu pro tio senfortiĝas. La lastenaskita — sufiĉe stranga — opinias, ke laŭ cirkonstancoj estas rekomendinde kuniĝi ĉu kun reakciuloj kontraŭ la policistoj, ĉu kun bolŝevikoj kontraŭ kapitalismo, ĉu kun individualistoj kontraŭ la troorganizemuloj ktp. Bedaŭrinde en tiu tendenco kvazaŭ patro de ĝi troviĝas kdo, kiu preskaŭ fanatike batalis por la organizacio ĝis kiam li estis petata forlasi la salajratan postenon favore al aliaj. La UA, opiniante, ke la anarkiista movado bezonas ĉiujn siajn fortojn, decidas alvoki ĉiujn anarkiistojn al komuna laboro, ĉi lasta estas sufiĉe grava kaj urĝa, por ke foriru antaŭ ĝi la malgrandaj malkontentoj, kiuj erarigas kelkajn kaj senmovigas la antaŭajn aktivulojn. Serioza kaj forta arganizaĵo devas kuniĝi ĉiujn sincerajn kdojn. Tial anarkiista organizaĵo, kvankam forta, devas resti sufiĉe fleksebla, elasta, por ke neniu ano sin sentu en ĝi subpremata.

Eble utilas, ke ni citu por niaj TLES-anoj amikoj la ĉefan parton de la organizaj principoj de la kongreso de UA. — La grupoj de unu regiono kuniĝas en Regiona Federacio, cele al propagando en tiu regiono, la tutaro de la federacioj formas la Franca Anarkiista Unio-n. — La kongreso deklaras, ke la personoj, la federacioj restas tute liberaj rilate al propra agado, ke la anarkiistaj grupoj administriĝas mem konforme al la temperamento de iliaj anoj. La kongreso lasas ĉiun grupon zorgi pri taksado aŭ netaksado de kotizoj kaj peni por havigi al si, per rimedoj laŭ ili pli taŭgaj, la necesajn sumojn.

Konsiderante, ke la organiza ideo por fariĝi praktika, necesigas firman aniĝon kaj regulan kotizon, decidas la kongreso akcepti la jenan formon por grupiĝo kaj kotizo al UA:

La grupoj sendos rekte al UA regulan monatan kotizon, minimume 0,50 fr. po ĉiu membro. — Ĉiujare krom la grupaj kotizoj UA demandos per kolekto de ĉiu membro 5 fr. kiel individuan kotizon. Por forigi la miskomprenon ekzistanta inter la kdoj aprobantaj la membrokarton kaj la aliaj, kiuj ne aprobas la individuan kotizon, estos kolektate dumaniere: 1e kontraŭ pago de siaj kotizoj la unuaj ricevos la karton ĉe sia grupo, 2e la duaj pagos al sia grupo kaj ne ricevas ateston. La izoluloj sendos rekte al UA la kotizon (kontraŭ ricevo de ilia karto aŭ nericevo, laŭ propra volo).

Alia grava demando estis diskutata: la rilatoj de UA kun eksteraj anarkiistaj organizaĵoj. Bedaŭrinde pro kaŭzo sendependa de la volo de la sekretario de TLES neniu TLES-ano ĉeestis la kongreson por raporti pri nia ligo. La kongreso decidis efektive rilati kun la eksteraj al UA organizaĵoj naciaj kaj internaciaj por pli ampleksa kaj praktika kunlaboro.

Jen la rezolucio akceptita rilate al tiu demando: La kongreso, konsiderante, ke morala kaj praktika ligilo de la diversaj anarkiistaj grupoj disigitaj tra la tuta mondo estas ne nur konforma al nia internacia idealo sed rekomendinda de ĉiuj praktikaj vidpunktoj: solidareco, unio en agado k. c., komisias la Iniciato-Komitaton ekinterrilati kun la anarkiistaj grupoj el ĉiuj landoj por aranĝi plej eble rapide Internacian Konferencon, kies celo estos: starigi la ĉefpunktojn de Anarkiista Internacia Organizaĵo.

*

Sekve de la decido de UA-kongreso, la sekretario de TLES je la nomo de la ligo sendis leteron al IK sin apogante sur la kongresdecido kaj proponis la servon kaj kunlaboradon de nia ligo.

Ni esperas bonan rezulton, ĉar ĝis nun ĉiuj informoj aŭ artikoloj tradukitaj kaj de ni prezentitaj estis afable akceptataj kaj uzataj. Sed ni penos, por ke UA konsideru en estonte nian ligon kiel inform-oficejon. Por sukcesigi la entreprenon kaj ĝustigi nian rolon en la internacia movado, ĉiu amiko devas plenumi sian promeson: liveri regule al TLES sciigojn el sia lando.

Ni denove kaj insiste alvokas la TLES-anojn al la laboro! *J. M.*

## La afero de revenĝo al Osugi kaj aliaj viktimoj.

(Speciala raporto por LL.)

Nun estis decidata la juĝo:

Kdo *K. Uada*, kiu pafis generalon M. Furuta, *malliberigo por tuta vivo* (senlima).

*D. Furuta*, kiu fabrikis bombojn kaj pikmortigis bankiston en urbo Osaka por gajni monon al anarkiista movado, *mortkondamno*.

Kdo *R. Ruraĉi*, kiu ŝtelis dinamiton el minejo kaj liveris al kdo *Furuta*, *malliberigo por 12 jaroj*.

Kdo *T. Ŝiutani*, kiu fabrikis ferkestojn por bomboj, *malliberigo por 5 jaroj*.

La decido estis publikigata la 10an de Septembro kaj la juĝisto estis minacata per nigraj poŝtoj, do ree kelkaj kdoj estis arestataj dum la tago de la decido.

La martiroj estis tre bravaj kaj ili deklaris, ke la juĝo t. n. severa, estis vera komika, kaj ili atestis la justecon de siaj agoj per la viktimoj.

Kdo Furuta baldaŭ estos mortpunata. Li transsendas eternan adiaŭon al la tutmonda kamaradaro kaj esperas grandan agemecon al kdoj.

Kdo K. Uada post unu semajno estos vestigata en ruĝvestaĵojn kaj al nur unu persono estos permesate viziti lin unu fojon por ĉiuj du monatoj; ĉe aliaj same.

La plej agemaj kdoj jam foriris de nia grupo, nia batalantaro estas tre malforta, sed ni batalos ĝis morti!

## Konferenco de la italaj sindikalistoj en Francio.

Je la 5a kaj 8a de septembro okazis en Parizo delegita konferenco de la forkurintaj Francion membroj de la Unio Sindikalista de Italio. Ĉi konferenco estas konsiderebla kiel daŭro de la landa konferenco de Unione Sindicale, kiu okazis antaŭ kelkaj monatoj en Italio, kaj pri kiu ni jam raportis. La rekonstruo de la sindikalistaj sindikatoj, komencita en Italio, devas daŭri per renovigo de la interligoj interĉiuj italaj sindikalistoj en eksterlando.

Klaran bildon pri la grava detruo de la sindikalista organizaĵo en Italio montras la reprezentantaro ĉe la konferenzo en Parizo. Oni konstatas, ke la direktantaj personoj de granda nombro de lokaj sindikatoj devis forkuri eksterlanden, ĉar estis detruataj iliaj organizaĵoj kaj ili mem estis persekutataj. Ĉeestis la konferencon reprezentantoj de la laborborso de Piacenza, reprezentantoj de la ekzekutiva komitato de la malnova laborborso de Bologna, reprezentantoj de la sindikalista organizaĵo de Prato Carnico, reprezentantoj de la terfoslaborista sindikato de Piacenza. Plu estis reprezentataj la laborborso de Betri Ponente, la sindikat-unio kaj la fervojista sindikalista organizaĵo de Livorno, la sindikalista metallaborista sindikato de Bolzaneto, la laborborso de Bazzano, Borgonovo kaj Taranto. Ĉeestis krome la sekretario de la laborborso de Mantovo, membroj de la ekzekutiv-komitato de la sindikalista unio de Spezia, membroj de la sekretariaro de la laborborso de Piombino, Elba kaj Maremma kaj de Vado Ligure. La ekzekutiv-komitato de la Unione Sindicale Italiana estis reprezentata per kdo A. Borghi kaj ILA per kdo A. Schapiro.

Post kiam kdo Fornasari, kiu nur antaŭ mallonge estis forlasinta Italion, estis raportinta pri la situacio en Italio, estis akceptata sekvanta rezolucio:

"La konferenco aŭskultinte la raporton de kdo Fornasari pri la malfacilaĵoj de la agado en Italio, esprimas sian aprobon kaj konsenton pri la klopodoj faritaj pro rekonstruo de la movado, same al la kdoj de ILA, kiuj donis financan helpon por la refunkciigo de la agado en Italio. Inter ili estas menciindaj speciale la kdoj el Argentinio kaj la italaj membroj de IWW en Nordameriko. Al la forkurintoj estas rekomendate oferi la laborenspezon de unu tago por solidaro, por helpi al la klopodoj de la kdoj en Italio."

La plej gravo demando estis tiu pri sindikata unueco. Estas situacio en Italio: La revoluciemaj sindikalistaj organizaĵoj estas detruitaj kaj nur subtere povas vivadi mizere. Kontraŭe preskaŭ neniel estis tuŝataj de la faŝismo la reformemaj organizaĵoj. Ĉi stato pli ol iam antaŭ instigis grandan nombron da anarkiistoj pledi por la eniro en la reformistajn sindikatajn kaj kunagi ĉe revoluciigo de ili. Sed la konferenco malaprobis tiajn inklinojn kaj deklaris per rezolucio:

"Kiel rezulto de la ĵusaj diskutoj, je konsidero de la ricevitaj leteroj kaj deklaroj de forkurintaj italaj sindikalistoj el diversaj landoj, pro konsidero de la lastaj okazaĵoj (sindikatkongresoj en Francio, subpremo de liberaj sindikatoj en Ruslando, subigo de la sindikatoj sub la influon de la komunista partio, la konsento de la koruptemaj sindikatoj en Francio kun la militpolitiko de la koloniema imperialismo, faŝisminklina konduto de la itala sindikatligo laŭ-Amsterdam-a), pro konsidero de la reala vivo, mizerstato de la laboristaro en ĉiu lando, la konferenco rekomendas al la revoluciema proletariaro ne partopreni je kunlaborado ĉe siaj perfidantoj, alifanke fidi je la renoviĝo-povo de la liberecana laboristmovado; ĝi plu rekomendas al revolucia proletariaro ne nur rezigni je kunagado ĉe aŭtoritatemaj kaj centralismaj organizaĵoj, sed ankaŭ aktive kunlabori ĉe la rekonstruo de liberecana laboristmovado, kian prezentas en Italio la Unione Sindacale Italiana kaj sur skalo internacia la Internacia Laborist-Asocio, kiu unuigas ĉiujn fortojn, kiuj daŭrigas la grandan batalon komencitan de Bakunin en la Ia Internacio."

*Tutamerika kongreso de la revoluciaj laboristoj.*

Laŭ instigo de la Ĝenerala laborista konfederacio de Meksiko (CGT) kaj de la Regiona Laborist-Federacio de Argentinio (FORA) okazos komence de novembro en Panamo amerika laboristkongreso, al kiu estas invititaj ĉiuj revoluciaj laboristorganizaĵoj de Ameriko. La adresoj de la kunvokintoj estas:

FORA, Parana 134, Buenos Aires, Argentinio CGT, Dolores 8, Mexico D. F., Meksiko.

## Pri la foririntoj.

Ni jam en kajero 2 mallonge sciigis pri la morto de niaj k-doj *Ricardo Mella* kaj *Pedro Esteve*. Decas, ke ni komuniku al la k-doj malgrandajn notojn pri la ambaŭ fervoraj batalantoj por nia sama ideo.

### Ricardo Mella.

Ricardo Mella naskiĝis 1861 en la havena urbo Vigo. Jam frue li aktiviĝis en la laborista movado de sia lando, kaj 21-jara li ricevis la oficon por redaktadi la anarkiistan gazeton "La Propaganda", kiu aperis de 1881—1883 en Vigo. Ekzistiĝis inter la agema Serrano y Orteiza kaj li, kiu kun sia tuta juneca fajro sin ĵetis en la movadon, tre intima amikeco, kiu pli gradiĝis, kiam Mella edzinigis la filinon de Orteiza. Mella fariĝis unu el la plej aktivaj kunlaborantoj ĉe "Revista Social" kaj liaj brilaj artikoloj jam tiam altiris la ĝeneralan atenton. Li apartenis al la plej kapablaj kaj batalemaj defendantoj de la kolektivisma anarkiismo, kaj sian vidpunkton li ankoraŭ defendis tiam, ki jam la plej granda parto de la hispanaj k-doj pledis por la komunisma anark. Per la studado de la malfruaj verkoj de Kropotkin la opinioj de Mella pri la kom. anark. ja ricevis gravan influon, tamen li neniam tute kaj plene aniĝis al la komunisma anarkiismo.

En jaro 1888 Mella translokiĝis al Sevilla kaj tie fondis la gazeton "La Solidaridad", kiu aperis ĝis 1889 kaj estis anstataŭata de "La Alarma". En "La Solidaridadad" unuafoje aperis lia verkaĵo "Sociala Sinopsio: Anarkio, Federalismo kaj Kolektivismo", kiu aperis poste kiel aparta libro. 1897 li kune kun José Prat eldonis la libron "La barbarie Gubernamental en España", kiu enhavis ĉiujn dokumentojn kaj abomenajn detalojn pri la reekestinta inkvizicio en la karceroj de la kastelo Montjuich. En Hispanio la libro aperis sekrete kaj same tiel ĝi estis disvastigata. Por erarigi la policon oni sur la titolfolio menciis kiel eldonejon la gezeton "El Despertar", kiun eldonis nia senlaca kdo Pedro Esteve en Nju Jorko.

Ricardo Mella kunlaboris ĉe preskaŭ la tuta anarkiista gazetaro de Hispanio kaj Suda Ameriko. Speciale valoraj estis liaj artikoloj en la revuoj "Revista Social", "Acracia" kaj "Ciencia Social". Estu menciataj liaj artikoloj "La Anarkio", "Mallongaj konsideroj pri la homaj pasioj", "Organizado, agitado, revolucio", "La krimo de Ĉikago", "La morala devigo", "La reakcio en la revolucio" el multegaj. Estus tre meritoplena ago de niaj hispanaj kdoj, se ili kolektus ĉiujn dislokitajn artikolojn kaj verkaĵojn de Mella por eldoni ilin en kelkaj volumoj.

Ĉe la enterigo de Ricardo Mella ĉiuj vendejoj kaj fabrikoj en Vigo estis fermaj, por doni lastan honoron al la altspirita mortinto. Li restis fidela al siaj ideoj ĝis la lasta sekundo. Lia nomo restos neforgesebla en la historio de lia lando kaj ankoraŭ ĝi fervorigos la animojn tiam, ki jam de longe ne plu estos restinta polvero de Prima de Rivera kaj liaj servistoj.

### Pedro Esteve.

Unu el la plej oferemaj pioniroj de nia idealo forlasis nin: Pedro Esteve, nia agema hispana kdo — ĝiatempe intima amiko de Angiolillo — redaktoro de la anarkiista organo "Laborist-Kulturo". Li mortis preskaŭ 60-jara je la sekvo de malsano. Lia laboremo kaj oferemo por la movado estas senkompara. Kiam li eldonis la gazeton "La socia demando" li mem pretigis la kompostaĵon en la propra presejo de la itala grupo en Paterson (Nju Jersi), nur por certigi la ekzistadon de la gazeto. Pri Pedro Esteve la internacia anarkiistaro ciam memoros unu el la plej bonaj proniroj.

### Max Goldstein.

Li estis komunisto, ni honoras ĉe li la modestecon, je kiu li, oferema, batalema revoluciulo, forlasis la vivon. En Rumanio, kie, se eble, la barbareco en la punejoj estas pli kruela, ol en la aliaj ankaŭ sufiĉe reakciaj landoj, troviĝis en tutmalhela ĉelo, katenita je manoj kaj piedo Max Goldstein, devigata kaŭri konstante en situo de dorskurbiĝo. Li multege suferadis, du jarojn, du eternecojn. — Nur libere moviĝi en sia ĉelo li volis, nur unufoje dum tago promeni en la korto de la malliberejo li volis. Tial li antaŭ tri monatoj ekkomencis manĝostrikon. — Ili lasis morti lin. Neniu atentis pri liaj suferoj, oni senkompate rigardis lian mortadon. Je la 15a de oktobro li ĉesis vivi. Honoron al tiu batalanto por la revolucio!

# La „ruĝa“ reakcio.

*(El Bulteno de l'Unigita Komitato por la helpo al enkarcergitaj revoluciuloj en Ruslando.)*

DETALOJ PRI LA LASTAJ ARESTIGOJ.

Jus ni ricevis jenan leteron el Ruslando:

Estimataj kamaradoj!

Vi jam scias, ke la 8an de Februaro 1925 en Leningrado okazis grandaj anarkiist-arestigoj. Dekkvin de la arestigitoj estas ekzilitaj 3 jarojn al Solovjecki-insuloj. Dum la loĝejaj traserĉadoj estas trovita korespondaĵo kun la al eksterlando forpelitaj kamardoj, same adresoj de Berlin-aj kaj Pariz-aj kamaradoj. La 2an de Marto la kamaradoj estas ekzilitaj. Kelkaj de ili manĝostrikis. La manĝostrikantoj, inter kiuj kelkaj troviĝis, kiuj de post 6 tagoj malsatis, perforte estas transportita sur ŝargaŭtomobilojn. Kutime la ektransporto de la al ekzilejo sendotaj arestitoj okazas merkrede, vespere inter la 6a ĝis oka. Ĉi tiuj kamaradoj estis surprizitaj marde je la 3a matene; kelkaj estas forpelitaj nude el la litoj. Kiam la ekzilitoj alvenis en Kemj (proksime de la Solovjecki-insuloj) ili iniciatiĝis ankoraŭfoje proklami la manĝostrikon por protesti kontraŭ la trakto kiel ordinaraj krimuloj. Oni perforte demetis ilin la suprajn vestaĵojn, eĉ kelkajn la ĉemizojn, kaj tiel one enbarakigis ilin mallibere. Ok el la kamaradoj tiam kelktempe estas fortransportitaj al Jaroslavli en la "Polit Isoliator“ (malliberejo speciale por politikaj kontraŭuloj). Iliaj nomoj estas: Matvaj Ssimuschin, Maria Poliakowa, Michail Losowski, Ivan Ssetschoff, Anatolij Denissoff, Nikolai Denissoff, Fjodoroff, Nikolai Bogdanoff.

Por la ĝusteco de la supre manifestitaj faktoj subskribis:

M. Poliakova. M. Ssimuschin. Michael Badin. Jaroslavlij, Polit-Isoliator Aprilo 1925.

LA GORĜPREMO DE MJASNIKOFF.

Ekzistas famo, ke Mjasnikoff (gvidanto de la "Laborista Grupo de l'Rus. Kom. Part estas gorĝpreme murdita en la malliberejo, ĉar li rifuzis sin reteni publike de sia posicio.

STATIKISTAJ NOMBROJ.

La ĝeneralaj kondiĉoj malhelpas nian komitaton, fari precizajn komunikojn pri la nombro de la en Rusio enkarcerigitaj kaj ekzilitaj revoluciuloj. Certe la nombro estas grandega. Laŭ sciigoj de la rusaj socialdemokratoj troviĝis komence de ĉi-jara Junio *89 000 homoj* en la ekzilo. El ili estis ekzilataj 3—5 miloj pro spekulacio, ĉiuj aliaj estas Socialistoj kaj senpartiuloj, kiuj estas persekutataj pro politikaj kaŭzoj. En la gubernio Archangelsk troviĝas sole 11 000 ekzilitoj, inter ili 2000 gejunuloj.

NOVAJ ARESTIGOJ EN RUSIO.

Laŭ informo ĵus ricevita el Ruslando estas arestitaj niaj kdoj *Aleksandro Levandovski*, loĝinta en Saratovo, kaj *Natano Futerfas* el Moskvo. Ambaŭ estis aktivaj *Satanoj* kaj kunlaborantoj ĉe *"Sennaciulo"*. Detaloj pri la arestigoj, ankaŭ kaŭzo estas ankoraŭ ne konataj. Ni supozas, ke la arestigoj okazis pro samaj motivoj, kiel tiuj ĉe Aron Baron, F. Rubinĉik-Mejer kaj aliaj persekutataj revoluciuloj.

*Kamaradoj! Laboristoj!* Kruela estas la situacio de la arestitoj en la karceroj bolŝevikaj. Sed ankoraŭ pli malbona estas la situacio de la ekziluloj. Kiel konata, estas nun regulo de la Ĉeko ekzili la kdojn jen post la sufero de la punoj. Labori estas neeblo, ĉar la Ĉeka malpermesas okupi ekzilulojn kiel laboristojn kaj oficistojn. Ili ricevas po monate 13 markojn de la registaro. Malsato, malvermego, senhejmeco kaj ĉikanoj de la lokaj Ĉeka-estroj estas la sorto de la el la malliberejoj liberigitaj kdoj.

Delegitaro eksterlanda de la partio de maldekstraj social-revoluciuloj kaj de la maksimalista unio.

J. Steinberg.

Reprezentanto de la Moskva Komitato por la helpo al la Anarkiistoj.

Aleksandro Berkmann.

Sekretario de la Unuigita Komitato.

M. Mratschny.

# Laborista movado.

## El la presservo de ILA.

*Bulgario.*

Ni jam esprimis nian abomenon kontraŭ la terura reakcio en Bulgario kontraŭ ĉiuj personoj de la progreso kaj unuavice kontraŭ ĉiuj revoluciuloj. Seninterompe ricevitaj novaj sciigoj pri sangaj krimoj devigas nin, denove raporti pri ĉi tiuj okazintaĵoj.

La helpkomitato por persekutataj anarkiistoj de Bulgario petas nin, publikigi la sekvantan alvokon. Publikigante ĉi alvokon ni plenumas nure devon de solidareco.

*Al ĉiuj revoluciaj laborist-organizaĵoj en la mondo.*

Kamaradoj! Jam du jaroj pasis depost kiam komenciĝis la terura buĉado de la revoluciuloj de Bulgario. Depost pli ol du jaroj sanga reakcio dezertigas tutan Bulgarion kaj minacas pereigi senreste ĉion kio estas libera kaj revoluciema.

Depost la tumultodeklaricio de la 9a de julio 1923 la registaro aplikis subpremajn rimedojn kiuj pli kaj pli akriĝis. La ekleviĝo de la proletariaro en septembro 1923 estis dronigata en sango kaj la provokoj ne finiĝis. Post la atenco en la katedralo en Sofio antaŭ kvar monatoj teruregan karakteron ricevis la sangaj persekutadoj.

La plej bonaj filoj de la popolo, egale ĉu anarkiistoj, komunistoj aŭ anoj de la vilaĝana partio aŭ sen aneco al iu partio, estas turmentataj kaj buĉataj en plej sovaĝa maniero. Estas neeble priskribi la sennombrajn krimojn de la ekzekutista registaro. Estas martirhistorio, kiu ne trovas samspecon en la tuta homa historio.

Oni scias, eĉ en eksterlando, ke la nombro de la viktimoj estas grandega, sed la nombro sola nenion pridiras. Ĝi ne povas elmontri la terurajn trajtojn de la sangosoifaj barbaraĵoj de la bulgaraj oficoj. Enketo necesas. Ne por fini la abomenaĵojn, tion devas fari la bulgara popolo mem, sed por registri ilin kaj montri la murdistojn al la malestimo de la tutmondo.

Tia enketo tiom pli necesas, ĉar la persekutoj, la arestigoj kaj fimurdoj al laboristoj kaj intelektuloj ankoraŭ ne estas finitaj. La plej sovaĝa subpremado estas daŭrigata. Post kiam estas murditaj centoj kaj miloj plenumas militjuĝoj la pereigon de la revoluciuloj. Miloj estas trenataj antaŭ la tribunalojn por respondi pri fiktivaj krimoj, kiujn ili ne faris. Centoj de arestitoj jam estas kondamnitaj al mortekzekuto kaj la nombro de tiuj, ki jam estas ekzekutitaj estas treege alta. Kaj dume la "justeco“ postulas daŭre pluajn mortviktimojn. La malliberejoj estas troplenaj, kaj miloj de arestitoj, kiujn atendas nekonata sorto, devas toleri nekredeblajn torturojn. Aliaj milope estas ĉasataj kaj persekutataj kruele, kaj la plej multaj el ili forkuris eksterlandon kaj tiel evitis karceron kaj morton minacintajn al ili.

Necesas helpo al ĉi ĉiuj malfeliĉaj viktimoj, la kuraĝaj batalantoj de la bulgara revoluciularo devas esti subtenataj.

Jam fondiĝis helpkomitato por bulgaraj anarkiistoj, kiu direktas al la tuta proletariaro de ĉiuj landoj la peton pro morala kaj materiala subtenado.

Estas centoj de kdoj, kiuj pereas en la malliberejoj kaj sub vere diabla reĝimo. Dekduoj de aliaj kdoj ja estas ankoraŭ liberaj, sed ili estas ĉasataj, persekutataj. Ili serĉas rifuĝejon en alia lando por fortiĝi por novaj defendaj bataloj.

Ni estas konvinkitaj, ke la kdoj de la eksterlando simpatios nian helpan entreprenon kaj alportos helpon por niaj bulgaraj fratoj.

L'adreso de la helpkomitato por bulgaraj anarkiistoj estas:

Berthe Fabert, Librairie Internationale,
14 rue Petit, Paris 19e, Francio.

Kamaradoj! La sekretariaro de ILA konstatas, ke la bulgaraj liberecanaj revoluciuloj ne estas aniĝintaj al ILA Tamen ili havis sindikatajn organizaĵojn bazantajn sur la principoj de la anarki-sindikalismo kaj estas supozeble, ke ili estus aniĝintaj, se libera disvolviĝo estus doninta al ili okazon por la aliĝo. La ekestinta reakcio tion malebligis. Car laŭ decido de la IIa kongreso de ILA ni subtenon devas doni nur al organizaĵoj aniĝintaj al ILA tial la sekretariaro ne rajtas propravole subteni la bulgarajn kdojn. Sed ni kredas samopinii laŭ spirito de internacia solidareco kun ĉiuj niaj membroj, se ni subtenas al alvokon de la bulgara helpkomitato kaj alvokas niajn membrojn partopreni plenpove al la helpagado por la persekutataj revoluciuloj de Bulgario. Ekzistas okazoj, je kiuj la internacia solidareco ne povas esti limigata de formalaj decidoj. Tia okazo laŭ nia opinio nun estas.

Ni vivas en tempo de reakcia alfluego. La faŝismo en Italio, la blanka diktaturo en Hispanio, la ruĝa en Ruslando donas malĝojigan aspekton de la mondo. La bulgaraj ekzekutistoj en ŝtata vesto ŝajnas unuigi la kruelecon de la italaj faŝistoj, la brutecon de la hispanaj militistoj kaj la senindulgon de la rusa Ĉeka. Kio okazas en Bulgario, tio superas tion de ĉiuj aliaj landoj. Malsupre ni montras liston de persekutoj, kiuj estas nur malgranda parto de la fakte okazintaj.

Konsiderante ĉi situacion, ni kredas trovi la konsenton de la kdoj de ĉiuj landoj, se ni alvokas ilin al protestkundvenoj kontraŭ la teruraj krimoj de la bulgara registaro, demonstri antaŭ la ambasadorejoj en ĉiuj landoj kaj entrepreni ĉiujn aliajn agojn, kiuj taŭgas en la unuopaj landoj. La proletaria mondkonscienco devas leviĝi kaj tondre voki al la bulgaraj ekzekutistoj, ke ili haltu en sia fiagado. Tiel eble la sorto de la persekutataj pioniroj de la libereco en Bulgario povas baldaŭ pliboniĝi.

La aliĝintaj al ILA organizaĵoj estas petataj, en okazo, ke ili konsentas subtenojn aŭ aranĝas kolektojn, sendi ĉiujn sumojn al la sekretariaro de ILA kun la signo "Bul". Sekret. de ILA peros la sumojn ricevitajn al la prirespondaj.

Vivu la internacia solidareco!

*Sekretariaro de ILA.*

Adr.: Fritz Kater, I. A. A., Kopernikusstr. 25, Berlin O 34, Germanio.

Ni estas jam publikigintaj unu liston pri la murdoj kaj krimoj de la bulgara registaro. Hodiaŭ ni daŭrigas:

Milita tribunalo en Samakovo kondamnis la konspirulojn de Ihtimano, 7 al morto, 2 al dumviva karcero kaj 5 al severa izoleca karcero je sume 33 jaroj. — La tribunalo de Kustendilo kondamnis 25 akuzitojn el la vilaĝo Polehinski al izoleca karcero je sume 194 jaroj kaj 10 monatoj. — En Sofio estas kondamnitaj pro la afero de la junaj komunistoj 30 personaj al severa izola karceropuno je kune 186 jaroj kaj 8 monatoj. Inter la kondamnitoj troviĝas ankaŭ infanoj. — Grupon de konspiruloj oni en Plovdivo kondamnis jene: al morto dron Sofio Dragaiĉev, dron Ivanov, advokaton Mahailov, Katjo-n Zlatorev kaj Dentjo-n Migiev; al dumviva karcero unu personon kaj 8 al severa izoleco je sume 77 jaroj kaj 4 monatoj. — Laŭ pledo de la advokato de 'l ŝtato estas publike mortekzekutitaj la kondamnitaj al morto Y. Kostov kaj K. Pietrov en Burgaso. — Militotribunalo de Vraha kondamnis 18 personojn al 200 jaroj kaj 10 monatoj da izola karcero severa. — Estas akuzitaj en Altoso 70 personoj. — En Kazanlajk unu el la 15 enkarcerigitaj lernantoj provis memmortigi sin. — En la regiono de Humino estas disponitaj 480 personoj al la juĝoficoj. — Arestitaj kaj trenitaj antaŭ la militribunalon estas en Ferdinand 30 personoj, en la vilaĝo Guhanski 50 personoj, en Glovacksk 75 personoj, en Bisloslatinen 18, en Oriehovskoje 15 kaj en Ĉirine 12 personoj. — La ŝtata ekzekustisto en Sofio ricevis por ekzekuti 3 personojn. — En la Gimnazio en Popov estas arestitaj kelkaj dekduoj da lernantoj. — En Smaokovo antaŭ la tribunalo aperis 26 personoj. Ŝtatadvokato por la plej multaj proponis mortkondamnon. — En Plovdivo estis trenata tuta junula grupo antaŭ la juĝistaron. — En Ĉirpano estas kondamnitaj 9 personoj de la militribunalo; el ili 8 al mortpuno. — En Plovdivo ŝtata advokato akuzas 69 personojn, kiuj "apartenas al la bandita bando" de Ŝtefano Ivanov, kiu estas mortigita kun 8 el liaj kamaradoj. La 69 estas akuzataj, ke ili kaŝis la bandon. — En Vracav estis trenataj antaŭ la juĝistaron 10 lernantoj. — En la regiono de Varna estis arestataj 144 personoj. — En Jelhovo estas arestitaj 48 personoj. Krom tio estas arestitaj la "konspiruloj" Dimo Todorov, Kr. Ivanov, St. Ivanĉev kaj P. Paounov.

Ĉiuj ĉi informoj venas el la oficialaj registaraj fontoj.

Gazetoj aperantaj en Bulgario raportas ankoraŭ pri sekvantaj faktoj:

En nro 88 de 2a de aŭgusto raportas "Svoboda" (Libereco):

"En Sevlievo estas mortigita de nekonata persono la vilaĝana deputito Marine Popov. La mortigo okazis apud lia domo ĉe la limo de la urbo."

En la sama numero de "Svoboda" estas raportite:

"En la ŝtata malsanulejo en Svihtov estas mortigita je la 26a de julio la malsana Milan Vasiliev de nekonata persono. Iam li estis komunista deputito."

*Murdigoj.* En Vraca estas mortigitaj dum paŝobatalo: Zafir Popov kaj G. Blagojev. 50 personoj estis arestataj, ĉar oni suspektas, ke ekzistas interligo inter ili. Por juĝo ili estas kondukotaj antaŭ la militotribunalon.

*Procesoj de la milita tribunalo en Rustĉuk:* En la proceso kontraŭ la unua grupo de la konspiruloj de Svihtov estas kondamnitaj 1 akuzito al morto kaj 29 aliaj al izola karcero je kune 297 jaroj. — En la proceso kontraŭ la dua grupo de la konspiruloj estas kondamnitaj 2 akuzitoj al morto kaj 13 aliaj al 95 jaroj da karcero. — En la proceso kontraŭ la konspiruloj de Gorna Orejovica estas kondamnitaj 2 personoj al morto, 13 al 94 jaroj kaj 8 monatoj da malliberejo.

*Kondamnoj de la militribunalo en Sofio:* 1 viro al morto kaj du virinoj karcero dumviva, ĉar ili estis donintaj azilon al la mortigita poste vilaĝana deputito D. Granharov. — En la proceso kontraŭ la junuloj: Velko Velkov, Lukas Levastakiev kaj Zarko Trfonov al morto, 13 personoj al 137 jaroj da malliberejo.

*Ceteraj kondamnoj.* En Lukovit: al morto Naiden Genov kaj 17 aliaj akuzitoj al 204 jaroj da karcero.

En Chumna komenciĝis la monstra proceso kontraŭ 420 akuzitoj. La advokato de la caro pledas je mortpuno ĉe 68 akuzitoj. — En Borisovgrad estas kondamnitaj 2 personoj al morto kaj 3 al 27 jaroj da karcero. — En Sliveno estis akuzitaj 64 personoj. El ili estas kondamnitaj al morto 10 personoj: Urdan Angelov, Martenov, Kr. Barimov, Iv. Barimov, A. Barimov, Iv. Dobrojiliev, G. Tanev, Zlata Dimova, Ivan Ganev, Stefano Simiĉiev. — Ĉe la proceso kontraŭ la 119 konspiruloj de Varna estas kondamnitaj al morto 33 personoj kaj la aliaj al sume 900 jaroj da karcero.

Ni ĉi tie nur citas malgrandan parton de la kondamnoj. Ankoraŭ ne menciitaj estas la kruelaĵoj kaj turmentoj faritaj al la arestitoj kaj akuzitoj. Reprezentantaro en Eksterlando de la bulgara Kampula Unio estas publikiginta grandan parton de la kruelaĵoj kaj murdoj per la libro: "La Bulgarie sous le régime de l'assassainat" (Bulgario sub la reĝimo de la murdistoj). Kelkaj cent paĝoj estas plenaj per nomigo de la kruelaĵoj Ni opinias, ke ja sufiĉas la jus citita por veki la abomenon kontraŭ ĉi reĝimo kaj por provizi niajn kamaradojn je materialo por ilia batalo.

### *Italio.*

*Persekutoj kaj arestigoj.* Meze de septembro okazis domtraserĉoj ĉe kelkaj kamaradoj kaj en la sidejo de la Unio Sindikalista en Milano, kiuj ne alportis sukceson. En la loĝejo de unu kdo estis trovataj membrokartoj kaj markoj de la sindikalista metalbranĉa sindikato kaj kelkaj pakaĵoj de la gazeto "Rassegna Sindacale". — Ankaŭ en aliaj regionoj de Italio okazis domtraserĉoj kaj arestigoj de revoluciaj sindikalistoj.

### *Brazilio.*

*Persekutoj.* Ankoraŭ niaj kdoj estas persekutataj okaze de la jam delonge ĉesinta politika revolucio. Multnombraj anarki-sindikalistoj estas en malliberejo de Rio de Janeiro, aliaj estas ekzilitaj al la ŝtato Para ĉe la limo Franca Gvajana kaj kelkaj al la insulo Trinidado. La lastenomitaj jam de 9 monatoj troviĝas en mizerega stato, vestite nur per tio, kion ili surhavis ĉe sia ekziliĝo. Unu el la enkarcerigitoj estas profesoro Otoicica, persekutata pro sia antimilitarismo.

Pro tia politika kaj ekonomia situacio en la lando la enmigrantaj laboristoj certe ne trovos la revitan "doradon".

*Laborbatalo*j. Ĉiam refoje venas novaj sciigoj pri la malbona situacio de la laboristoj en Brazilio. Plej mizere kompreneble fartas la enmigrintaj laboristoj. La *ŝuistoj* en Porto Alegre estis devigataj striki pro sensignifa pliàltigo de la salajro. La striko finiĝis per kompromiso. — La tajloroj ankaŭ devas tre suferi pro malbonaj labor- kaj salajrokondiĉoj. En laborejoj, kiuj estas nepriskribeblaj, devas labori kvalifikaj tajloro 10 kaj 12 horojn potage je salajro de 120 ĝis pleje 220 milrejsoj por la monato. (30—57 spesmiloj). Samtempe loĝeja luo kaj nutraĵoj estas same tiomkostaj kiel en la plej multaj eŭropaj landoj. Kudristinoj perlaboras 1½ ĝis 3 milr. po tago. Por plibonigi siajn salajro- kai laborkondiĉojn ankaŭ la tajloroj ekstrikis. — Ankaŭ la bakistoj de Porto Alegre devis uzi la striko-batalilon por defendi siajn interesojn. Oni vidas, ke la situacio de la laboristo estas neniel bona, kaj ke elmigrado al Brazilio vere ne estas profita.

## SUD-AMERIKA KRONIKO.

*La tragedio de Inquique. — La faŝismo en Ĉilio. — La situacio de la revolucia movado en Peruo. — La Panamokonferenco.*

Inquique estas urbo en la salpetrobaseno de Ĉilio. Ĝia nomo meritas esti ĉizata en la tabulojn de la historio revolucia. Ĝi estas urbo de la tragedioj de la proletariaro, sed ankaŭ ĝi estas urbo de la propagando por la memliberigo, kiun ne povis detrui la riveregoj de la sango laborista verŝita de la tiranoj de la lando.

Komence de la jaro 1908 la laboristoj el la salpetrominejoj prezentis al siaj ekspluatistoj la postulon pri altigo de la salajroj, malpliigo de la labortempo kaj pri disponigo al ili de ejo por vesperaj kursoj. La ekspluatistoj malplenumis ĉi postulon, kaj pro tio la ministoj komencis la strikon forlasante la minejojn kaj koncentrigante sin en Inquique. La urbaj oficoj komence disponis al la strikantoj la konstruaĵon de lernejo, kaj ili tie aranĝis sian ĉefan kunvenejon. Sed la burĝaro pro la minaca aspekto de la strikantaj amasoj ektimis kaj postulis specialajn kontraŭrimedojn.

La guberniestro de Inquique malpermesis kuneston de pli ol 6 personoj kaj petis plifortigon de siaj fortoj el Santiago. Nun la strikantoj kunvenis en la ejo, kie sin estis instalinta la strika komitato, ĉar la policistaro malhelpis al ili moviĝi sur la strato. Dume alvenis la generalo Silva Renard kun 1500 soldatoj sur militŝipo. La generalo ordonis, ke la strikantoj forlasu la lernejon, kaj ĉar ili ne tuj obeis, li lasis direkti maŝinpafilojn al la konstruaĵo kaj ordonis al la soldatoj ekpafi. La rezulto estis la *murdigo de pli ol 400 laboristoj;* sescent aliaj estis vundataj. Dudek soldatoj, kiuj ne volis partopreni la masakron, estis mortekzekutataj senceremonie.

Ĉi sangoverŝo trovis funebran eĥon ĉe la tuta amerika proletariaro. Ĉila registaro malligis uraganon da persekutoj kontraŭ la anarkiista propagando, eltrovis famon pri teroristaj komplotoj, konfiskis la gazetaron kaj ekzilis la plej agemajn kamaradojn; sed post mallonga tempo la revolucia movado ekstaris pli forta ol ĝi estis antaŭ la masakro. Inquique nun iĝis grava centro de la anarkiista propagando; antaŭ kelkaj jaroj eĉ eblis eldoni ĉiutagan gazeton "El Surco" (La sulko), kaj la batalo kontraŭ la polica arbitreco estis unu el la ĉefaj taskoj de niaj tieaj kdoj. Preskaŭ ĉiam ili disponis pri organo en la gazetaro, kies ekziston ili devis defendi je grandaj oferoj. Komence de la jaro 1922 ili eldonis la semajnan gazeton "El sembrador" (La Semisto), kiu translokiĝis 1924 al Valparaiso; ĝian lokon tuj okupis alia semajna gazeto "El Surco", kiu aperis, ĝis kiam la diktatoreco de Alessandri kaj de la militaristoj sentis sin sufiĉe forta por subpremi la tutan liberecanan gazetaron; kaj nova tragedio igas funebri la laboristaron de Inquique.

Pro tute sensignifaj motivoj, sen pravaj kaŭzoj, nur por pereigi la laboristmovadon en la salpetrozono de la provinco Tarapacà, la ĉila registaro aranĝis memorindan sangoverŝon. Milojn da soldatoj kun pezaj kanonoj, kvazaŭ okazus milito, oni sendis je la unuaj tagoj de la junio al la salpetroregiono por dispafi la tieajn laboristojn. Baldaŭ en Inquique disvastiĝis la scio pri la verŝita sango, kaj komenciĝis ĝeneralstriko, la registaro malpermesis la anarkiistan kaj komunistan gazetaron kaj la sindikatoj ekmalfunkciis. La vico de la persekutoj komenciĝis ne nur en Inquique, sed en la tuta lando. La preteksto de la registaro por tio estis, ke la ministoj estus ekokupintaj la oficejojn de la grandega salpetroentrepreno "Compania Coruna" kaj ke ili estus bone armitaj kaj pretaj fari revolucion en Ĉilio. Sed estas pruvo kontraŭ ĉi infama mensogo la fakto, ke eĉ ne unu soldato mortis en la "batalo", dum la soldatoj mem kiel revenĝon, kiel heroaj admirantoj de la prusa reĝimo, liveris la teruran nombron de 2000 viktimoj je mortigitoj kaj vunditoj. La fabelo disvastigata de la registaro estas ordinareca mensogo. Ĉerte estas, ke la militista diktaturo ne kapablis bari la reekstaron de la batalema proletariaro kaj ke plenumis la renegato Asturo Alessandri tion, kion ne atingis la militista diktaturo. Nia gazetaro estis multnombra: ekzistis ses aŭ sep anarkiistaj organoj kun propaj presejoj en Inquique kaj Valparaiso; nuntempe nur ekzistas sindikata organo de la maristoj en Valparaiso.

Ĉi tie nun sekvas la represo de kelkaj faktoj, kiujn rakontis kelkaj postvivantoj de la hombuĉado en la Pampa (laŭ "La Protesta", Buenos Aires, 19a de julio 1925):

"La viktimoj superas la nombron 2000 kaj estas pleiparte virinoj kaj infanoj. — Ne povis okazi aliel je la ekzistintaj cirkonstancoj kaj pro la agmaniero de la soldatoj, kiuj estis senditaj por neniigi la strikon; dekomence oni ne uzis infanterion, sed starigis kanonojn por povi sen danĝero buĉi la laboristojn. Pro tiu konduto de la soldatoj la malfeliĉaj kamaradoj antaŭsentis la teruran veron kaj por veki la normalan senton de kompato, kiun devus havi ĉiu homo, ili starigis la virinojn kaj infanojn en la unuan vicon. Sed ili ne estis pripensintaj, ke la militista disciplino faras el homoj la plej sovaĝajn bestojn. La oficiroj ordonis la pafadon kaj la obusoj faris sian pereigan laboron . . ." La heroo de la tago ĉifoje estis generalo De La Guardia.

Post ĉi sangobano komenciĝis teruraj persekutadoj de la postvivantoj. Centope oni deportis. Meze de julio oni kondukis pli ol 500 familiojn al Santiago kaj akuzis ilin je kulpo pri la nesukcesinta "revoluvio". Granda nombro da kamaradoj estis enkarcerigataj sur militŝipoj kaj oni nenion scias pri ilia sorto. — Inter la instruistoj estis ekvivinta movado por pedagogiaj postuloj, ĉar ili en Valparaiso estis interkonsentintaj turni sin al la sindikatoj pro helpo por la batalo kontraŭ la reakciaj reformoj, kiujn intencas efektivigi la registaro. Sep instruistoj estas forigitaj el siaj oficoj flanke de la magistrato. Formiĝis por partopreni la kontraŭproletarian laboron de la registaro faŝistaj grupoj, kiuj publike postulas la kapojn de la revoluciaj propagandistoj. Ni posedas manifeston publikigitan en Valparaiso. Ĝi havas la titolon: *"La anarkiista kaj bolŝevista propagandoj ankoraŭ en Ĉilio progresas. — Militon al la aĉetitoj per perua mono!"* Tio estas mensoga dokumento, la frukto de la soifo de la ĉila burĝaro al proletaria sango.

Gravaj estas la sangoferoj de l'argentina Patagonio kaj tiuj de Uncia kaj Ica, sed, kiel dolora eĉ estu la impreso, kiun igas al ni la militarisma barbareco en Ĉilio, ni tamen estas certaj, ke nia movado leviĝos el la sango de la viktimoj de Tarapacà pli forta pli sana ol antaŭe.

Ni jam parolis pri la pretekstо, kiun uzas la ĉila registaro por persekuti la revoluciajn laboristojn. Ĝi kulpigas ilin, ke ili estus aĉetitaj per perua oro . . . Ĉi sama preteksto servas al la registaro de Peruo, por pereigi niajn plej aktivajn kamaradojn en Peruo. La afero de Tacua kaj Arica estas por la reakciaj elementoj en Ĉilio kaj Peruo la okazoj por konstanta ŝovinisma propagando kaj ĝi estas jam depost kelkaj jaroj la militdanĝero por la laboristoj de ambaŭ landoj. La venenigo de la socia psiko ĉiam pli kaj pli grandiĝas. La anarkiistaj grupoj de Peruo sendis al ni sian proteston kontraŭ la naciistaj mensogoj kaj publikigis alvokon pro solidareco al la laboristoj de la tuta mondo, por eviti novan buĉadon kiel rekompencan oferon por la ŝtataj privilegioj, pri kiuj ja la proletariaro interesas plej malmulte. Peruo ankaŭ estas lando, en kiu la proletariaro devas suferi per la registaro kaj per la aroga kapitalismo je pli ol unu rilato . . . Sed niaj kamaradoj ne malkuraĝiĝas kaj la persekutadojn ili kontraŭas heroe, forigante unu post la alia el la baroj, kiujn metas la registaro al ili. Dum la lastaj jaroj la subpremado flanke de la registaro pliiĝis, sed pli grave domaĝis la perfido de kelkaj tielnomataj anarkiistoj kaj ilia subiĝo sub la ordono de Moskvo. La laborista federacio de Lima, kiu estas fondita de niaj kdoj, nuntempe troviĝas en la manoj de ankaŭrevoluciuloj, sed la moskva regado, kiu estas protektata de la reakcia prezidanto Legnia ne daŭros longe, kaj jam oni povas konstati signojn de la ruiniĝo. Inter la sindikatoj en Lima, kiuj restis fidelaj al siaj antiaŭtoritataj tradicioj troviĝas la sindikatoj de la konstrulaboristoj, ĉarpentistoj, de la laboristoj pri nutraĵoj kaj aliaj, sen kalkuli la anarkiistajn grupojn de Lima, Callao, Miraflores Arequipa ktp.

Laŭ la sciigoj ricevitaj de kdo el la konstrulaborista sindikato en Lima oni jus fondis en Callao kaj Miraflores sindikatojn de diversaj metioj, kaj oni intencas fari tion ankaŭ en aliaj urboj. En Arequipa estis fondata antaŭ kelkaj jaroj anar-

# Tutmonda Ligo de Esperantistaj Senŝtatanoj.

Adreso: J. M. Esperanto, 9 rue Louis Blanc, Paris X.

## Al la kunlaborantoj de L. L.

Bedaŭre ni devas akuzi kelkajn el niaj kunlaborantoj. Manuskriptpaperaj ondegoj alfluas ĉe la — *administrejo* de la revuo. Unuflanke la kdoj rilatante al la administranto volas ŝpari afrankmonon kaj uzas la okazon samtempe sendante ankaŭ siajn manuskriptojn al Berlino por perado al la redaktejo en Parizo. Aliflanke la kdoj volas ŝpari tempon kaj ebligi tujan aperon de ilia verkaĵo en la ĵus aperonta kajero. Evitante la tempomalŝparon ili sendas rekte al Berlino anstataŭ al Parizo, de kie la manuskriptoj ja fine ankaŭ iras al Berlino. La kdoj bone komprenu: La firmigo pri la redaktejo neniel allasas dubon: *ĉiujn* manuskriptojn sendu al *J. M. Esperanto, 9, rue Louis Blanc, Paris.* Nur sur la lasta paĝo ni rimarkigis, ke *nur aktualaj raportoj* povas esti sendataj senpere al Berlino: raportoj pri laborista movado, arestigoj ktp., sed *nepre* de raportoj pri *TLES-aferoj* sendu samtempe *kopion* al la landa kaj interlanda *sekretarioj*. Tio gravas, ĉar ili devas esti informataj pri ĉio, kio okazas en TLES. Sed ni avertas, ke poeziaĵoj (cetere neprespretaj) ekzemple ĝenerale ne estas aktualaj raportoj. Ni riproĉas, ke la kunlaborantoj okaze volas ŝpari afrankmonon, kio eblas nur ĉe samtempa ŝargo je afrankelspezoj al nia Eldona Komisiono. Tiu treege bezonas monon por L. L., kion ja scias, sed bedaŭre ne ĉiam konscias ĉiu kdo. Niaj berlinaj kdoj jam elspezis sufiĉe por sendi la ricevitajn manuskriptojn al Parizo. Estonte ili tion ne plu faros, kaj manuskriptoj ne sendataj al la redaktejo ne povas esti presotaj. Se la verkantoj celas tempoŝparon, evitante la vojaĝadon de la manuskriptoj al Parizo kaj de tie al Berlino, ili maltrafas. Povas ja okazi, ke artikolo pri iu certa temo estas ĵus dezirata por egaligi diverspezon de diverstemaro, tamen la presotajn materialojn elektas ja la redaktoroj el la disponebla artikolaro. Cetere, revuo ne estas ŝtopata kiel kolbaso. Tion pri la adresigo de la manuskriptsendaĵoj. — Pri la manuskriptoj mem — ho ve: terure. Kompreneble ekzistas manuskriptoj nekritikeblaj, *ties* verkintojn ni *ne* celas. Sed kelkaj manuskriptoj estas nelegeblaj eĉ por ni, kiel do por la kompostisto, kiu ne scias Esperanton. Ĉe aliaj malklaras la enhavo (ĝenerale ĉe tradukoj: estas tradukitaj el nacia lingvo frazegoj anstataŭ pensoj); faru do ne tro longajn, komplikajn frazojn. Ni eĉ ricevis foliojn, kiuj estas skribitaj ambaŭflanke, tiuj povos do aperi en L. L. nur post kiam nia tempo estos permesinta al ni la kopiadon de la dorsflanko sur apartan folion. Oferu do por TLES kaj L. L. iom pli da papero kaj ne kunigu vian aliĝanoncon al TLES kun verkaĵo por L. L. Antaŭ ĉio, ĉe verkado zorgu, ke via artikolo, raporto estu facile korektigebla, *inter la linioj* kaj ĉe la rando lasu sufiĉe da spaco. Skribu zorge, por ke kompostisto neesperantista facile ekkonu, ĉu n aŭ u, ĉu a aŭ o, ĉu c, r aŭ s ktp. Ĉe maŝinskribita artikolo neniun titolon skribu grandlitere, ĉar kompostisto ne scias, kiu vorto devas komenciĝi per grandlitero aŭ ne. La titolojn ne substreku. Malbona skribado kaŭzas oftfojan presrevizion, tempmalŝparon, presprokraston. Gravas, ke ni ne havu evitablajn tempoperdojn, ĉar ĉiujn TLES-laborojn ni devas fari post nia ĉiutaga laboro. Helpu simpligi niajn taskojn por la bono kaj prospero de L. L. kaj de TLES.

## Konferenco de TLES-anoj.

Je la 20a de septembro en Mannheim okazis konferenco inter TLESanoj el Frankfurt a. M. kaj Mannheim. Ĉeestis kdoj de la "Federacio de komunistaj anarkiistoj, Mannheim" kaj de "FAUD (A-S), loka grupo Mannheim".

Kdo Möckel, Frankfurt, paroladis pri "Laboristesperanta movado kaj kial ni fondis TLES". Li citis ĉiujn faktojn okazintajn dum la lastaj jaroj en la lab. Espo.-movado kaj la ĉeestantoj ĉiuj interkonsentis kun la fondintoj de nia ligo.

Pro vigligi kaj faciligi nian propagandon kaj por ke la aktivuloj interkoniĝu, la ĉeestintoj deziris, ke la enlandaj sekretarioj dissendu membrolistojn al konfidindaj kdoj ĉiulokaj.

Pri la organizado de TLES en Germanio oni unuiĝis, ke ne jam ebligas dispartigo laŭ landoj aŭ distriktoj, sed ni devas atendi, ĝis kiam nia membronombro estos pliatiĝinta, por ke ni ekkonstruu de sube al supre, sed necesas, ke niaj aktivuloj vigle propagandu nian ligon kaj daŭre interrilatu.

Pri gazetarservado oni interkonsentis, ke iu ajn destinota kdo interrilatu kun iu ajn destinota gazeto kontraŭaŭtoritata, kaj ke ankaŭ necesas, forpreni laboron de niaj berlinaj kdoj trookupataj. Tial ĉiu kdo scipovanta Esperanton estas devigata disponigi sin al servado en nia afero.

Koncerne de la enketo aperinta en nro 1 de la "Libera laboristo" oni opiniis, ke estus pli bone finance kaj enhave fortigi nian revuon kaj nur post tiam eldoni dusemajnan informilon.

*J. R. Mhm.*

## Kelkaj punktoj.

*Monsumoj* ofte atingas nin, sen ke la kdoj mencias, ĉu la mono sendita estu kotizo, abonmono aŭ donaco al la revua kaso.

*Kotizoj* nepre devas esti pagataj kune kun aliĝanonco. Lastatempe multaj kdoj (eĉ tre konataj kiel seriozaj, agemaj) anoncis sian aliĝon kaj hezitas tamen pagi kotizon. Kdoj troviĝantaj en financa mizero kompreneble ne bezonas pagi kotizon, sed almenaŭ ili devas sciigi nin pri nekapableco de pago. Ankaŭ Libera Laboristo estas liverata al nepovantaj tuj pagi kdoj post ilia sciigo pri tio. Tamen la abonmono restas ŝuldo kaj tuj devas esti pagata, se la koncerna kdo havas regulan laborenspezon.

*Aliĝilo-demandaro* estas dissendata kun ĉi tiu kajero al ĉiuj membro aŭ simpatianta abonanto, kiu ne jam aliĝis al TLES. Ĉiu kdo aŭ subtenanta grupo aŭ organizaĵo ricevas du ekzemplerojn, el kiuj unu sendi al la Interlanda Sekretario kaj la alian al la Sekretario de la koncerna lando. Grupoj aŭ individuaj subtenantoj nature ne bezonas respondi tiujn demandojn, kiuj koncernas karakterizon de unuopa aktiva membro. Se mankas, demandu pluajn ekzemplerojn de Eldona Komisiono en Berlin.

## Tradukantoj serĉataj.

Pro la ĉiam pli ampleksiĝanta presservo de ILA la fortoj de la tradukantaj kdoj ne plu sufiĉas por regule kaj senprokraste traduki la germanlingvan tekston de la Presservo de ILA en Esperanton. Tial la sekretario de ILA sin turnis al mi, ke mi alvoku la germanajn TLES-anojn lingvospertajn al kunlaboro. Temas pri interdivido de la laboro urĝa. La kdoj, kiuj anoncas sin pretaj al konstanta kuntradukado (nepre tutsciantaj Esperanton), regule ricevos sian parton perpoŝte kaj post tuja tradukado devas resendi la tradukaĵon al la adr. de Eldona Komisiono.

Bezonataj estas ankoraŭ 4 aŭ 5 tradukantoj.

*Hans Manske,*
TLES-Sekretario por Germanio.

## Ĉu TLES vivos?

Jes, se ni bone organizos ĝin! La kdoj Tlesanoj bone scias, ke niaj statutoj, publikigitaj en kajero 1a, estas nur provizoraj. La organizecon de Tles ili nur nedetale skizas. Organizaĵo sen organizeco estas paradoksaĵo, tial la kdoj devas helpi ĉiumaniere al organizado.

Estas necese, ke niajn grupojn kaj izolulojn ni kunligu. Necese ankaŭ estas, ke la kdoj, kiuj apartenas al iu certa organizaĵo (en Germanio ekz. ĉu al AAUE, FAUD, Federacio de kom. anarkiistoj ktp.), aŭ kiuj legas aŭ kunlaboras iun liberecan gazeton, revuon, ke ili interkonsentu pri la diversaj fakoj de tradukado, informado ktp.; rezume: necesas enoficigi konstantajn perantojn inter TLES kaj la aluditaj organizaĵoj ĉu subtenantaj, ĉu varbotaj aŭ gazetoj. Sed bezono estas, ke la kdoj, kiuj havas iun certan taskon, estu konataj, por ke iuj laboroj ne estu farataj ankaŭ de aliaj kdoj, kies fortoj estus uzeblaj por plenumi aliajn taskojn.

Jam bezoniĝas t. n. jarlibro kun adresaro de niaj membroj. Pro la multiĝinteco de la membraro ne plu eblas, dissendi multobligitajn membrolistojn.

Pro ĉi konsideroj estas tre aprobinda la efektivigo de la bonega ideo pri demandaro-aliĝilo, kiun ĵus eldonis la Interlanda Sekretario. Certe ĝi estas bona rimedo por kolekti la materialon necesan por organizado kaj kompilo de la jarlibro, kiu esperinde povos aperi en februaro. *Garaŝin.*

## Kiel ni organizu nian ligon kaj ties gazetarservon?

Konsiderante la celon de nia ligo, peradi inter la laboristaro tutmonda liberecana, kaj por faciligi ĉi peradon, necesas, organizi laŭplane TLES-on kaj ties gazetarsrevon. Konferenco inter kdoj el Frankfurt a. M. kaj Mannheim, okazinta je la 20a de sept. en Mannheim, starigis jenan organizoplanon, kiun ni donas al diskutado de la TLESanaro.

La centro de nia ligo estu internacia sekretariaro, konsistanta el sekretario, redaktoro kaj administranto. En ĉiu lando

estu elektata Landa Sekretario, kiu peradu inter la enlandaj kdoj kaj la internacia sekretariaro. Ĉiuloke, kie troviĝas kelkaj TLESanoj, ili fondu grupojn, el kiuj unu kdo peradu inter sia grupo kaj Landa Sekretario. Izolmembroj interrilatu mem kun la Landa Sekretario. Ĉie, kie tio ebliĝas, kelkaj grupoj unuiĝu en propagandodistriktoj.

Nian gazetarservon ni organizu jene:

Por malhelpi, ke kelkaj kdoj tradukos samajn artikolojn, necesas, ke en ĉiu lando unu grupo aŭ propagandodistrikto disponu tuj post apero de "Libera Laboristo", kiuj artikoloj estas tradukindaj nacilingven, kaj disdonu ĉi artikolojn pro traduko al la koncernaj kdoj. La tradukaĵoj estu resendataj al la disdoninta grupo, kiu korektu kaj enpresigu ilin en la gazetaron nacilingvan.

Same ni agu tradukante artikolojn el nacilingvaj gazetoj, kiuj estas destinataj al presigo en "LL".

Kompreneble tio ne eksigas, ke ĉiu kdo rajtas verki orginalartikolojn, aŭ traduki aliajn verkaĵojn. Sed ĉi tiuj estu sendataj senpere al la Landa Sekretario. Pri laborbataloj, bibliografio ktp. ĉiu lando unu kdo raportu konstante senpere al la Landa Sekretario. *J. R., Mhm.*

### Eldona komisiono.

La enketo instigita de kelkaj agemaj kdoj alportis multege da respondoj. Ni zorgeme ekzamenis la respondojn kaj konstatis, ke ĝenerale la TLES-anoj tre deziras posedi ofte elirantan informbultenon, multaj eĉ opinias, ke tia dusemajna kvarpaĝa folio estas nepre necesa. Sed bedaŭrinde jesaj respondoj al la 5a demando ne abundas. Aliaj respondoj (la granda plimulto), ne neantaj la utilecon, eĉ bezonecon de tia sciigilo, opinias, ke pli gravas la revuo por ni, ĉar nur ĝi povas plenumi samtempe ĉiujn taskojn de nia ligo. TLES havas diversajn taskojn, al kiuj sola revuo povas utili pli bone ol sola informilo. Verŝajne tiuj kdoj (la plimulto) bone konscias pri niaj fortoj kaj ne volas projekti neefektivigeblaĵojn. Prave, ĉar, ni konfesu tion publike: niaj financaj fortoj ne sufiĉas por jam nun eldoni du ligajn organojn. Ebligas ĝis nun nia financa stato nur por eldoni 16-paĝan revuon ĉiun duan monaton, eble iomete pli, sed ne jam sufiĉus ekzemple por 20 paĝoj. Estas decidite per la respondoj al la enketo, ke la *eldono de dusemajna kvarpaĝa informfolio estu prokrastata ĝis kiam aperos L. L. ĉiumonate je 16 paĝoj.* Por povi tion efektivigi ni bezonas ankoraŭ 800 novajn abonantojn. Tial la kdoj nepre devas daŭrigi, duobligi sian varbadon. Certe, se L. L. aperas *ĉiumonate* ĝin abonus pli multaj ankoraŭ laboristesperantistoj, tial ni ankaŭ sen esti ricevintaj 800 novajn abonantojn eldonos la revuon *ĉiu monate* tiam, kiam ni estos ricevintaj certan sumon, kiu ebligos al ni pagi 6 kajerojn el ĉi kaso garantia. Tiel la aperado ĉiumonate dum unu tuta jaro estus garantiita. Por la garantia kaso ni jam kolektis ĉiujn donacojn por L. L. kaj ni igos en ĝin ĉiujn abonpagojn, kiuj superos la sumon bezonatan por pagi la nunajn dumonatajn kajerojn. Sed ankoraŭ treege ni devas kolektadi kaj la TLES-anoj devas ankoraŭ netrinki kelkan ĝlason da biero, oftege ankoraŭ maltramveturi, rezume malmalŝpari multe da mono por havigi al la Eldona Komisiono la sumon necesan, kiu garantias la pagon de ses kromaj kajeroj. Kompreneble tiam ni ne bezonus altigi la abonprezon, kvankam ni liverus je la sama sumo la duoblan kvanton da paĝoj. Eble ni jam pli frue (se ni havos monon por 4 kajeroj eble) ĉe ne grava plialtigo de la abonprezo povus efektivigi la ĉiumonatan eldonon. *Ĉiumonateco* de L. L. *estas certa, la kiamo dependas de la oferemo kaj varbokapablo de niaj kdoj.*

La rezulto de ĉi oferemo kaj de nia kolektado estas la jena; Ni ricevis donacojn kaj subtensumojn post la garantiigo de regula dumonata aperado de L. L. sekvantajn sumojn laŭ germ. markoj:

Solaris 3,50, Donaco 0,90, Nietzsche (Chemnitz) 1,—, Ibikus 4,65, Murr 3,68, Esp.-Rondo "Homiĝu" 1,14, Praxedes 0,32, kdo Szency 1,—, P. Konstantinu 0,30, Intestudemulo 0,50, Weder (Nju Jorko) 159,90, TLES-grupo de Eisenach 5,—, Tribulaun 0,75, Lucifero 0,60, Roth (Esslingen) 3,35, Malspritulo 3,70, "Amikoj" 0,70, Donaco 0,30, K. P. (Hannover) 0,80, P. R. (Groningen) 0,60, Donaco 0,30, Donaco 0,29, SAJD (Mannheim) 10,—, Anark. Asocio (Bruselo) 2,50, Intestudemulo 4,—, R. K. (Paunsdorf) 1,75, Vilaire 2,84, P. L. (Bischofshofen) 1,20, O. T. (Kopenhago) 2,30, R. L. (Brno) 3,—, Agemulo 6,45. — *Sume 227 gmk., 32 pfenigoj.*

Sufiĉas ĉi sumo por pagi duonan numeron, ni bezonas do ankoraŭ pli ol dekoble tiom. La nelaciĝanta ankoraŭ kreskanta oferemo de niaj kdoj tion baldaŭ efektivigos.

La abonprezo por ses numeroj restas la sama: 5 aŭstraj ŝilingoj, 42 britaj pencoj, 3,25 germ. m., 4 svisaj fr., 1 usona dolaro aŭ egalvaloro en alia nacia mono. Novaj abonantoj por la jaro 1926, kies abonpagon ni ricevos ĝis la 20a de decembro, ricevos krom la 6 numeroj aperontaj dum 1926 ankaŭ la unuajn 3 nrojn de la jaro 1925 laŭ sufiĉo de la ankoraŭ disponataj ekzempleroj. Malnovaj reabonantoj ĝuas dekprocentan rabaton, se ili pagas tiom frue, ke ni la abonpagon ricevos ĝis la 20a de decembro.

### TLES vivos.

Nia ligo ekzistos, se ĝi estos aro da agemuloj. Organizaĵo el agemuloj kaj el konsciaj anoj havos longekzistadon.

Por tielmaniere okazigi, necesas, ke ĝiaj fondintoj atente rigardos ĝin.

*TLES,* organizaĵo el anarkiistoj nur devas enhavi bonajn aliĝantojn.

Ni, unuaj TLES-anoj, unu penson ni devas havi: la kvalito de de niaj samliganoj kaj ne la ilia kvanto.

Multaj malbonaj kamaradoj igos malbonan organizaĵon, kiun oni deziras bonan: male, malmultaj bonaj kamaradoj rapide igos bonan kaj fortikan organizaĵon, kiu sin kredas malforta.

Vere TLES estas la unua tutmonda anarkiisma organizaĵo. Ekzistas *tutmonda anarkiista unuiĝo,* sed ĝi estas de franca lingvo.

*TLES* havas plej altan taskon: la vera unuiĝo de l'anarkiistaro el ĉiuj landoj, kiel sola familio, parolante la samlingvon. *F. Costa.*

### Redakciaj Respondoj.

*J. E., Graz, Ino III, M. K. en I.:* Viaj artikoloj jam estas kompostitaj, sed ne sufiĉas la spaco de Nro. 3, ili do aperos en Nro. 4. *Eld. Kom.*

*W. P.* Via traduko estas ankoraŭ tre neperfekta. Ne traduku frazojn, sed pensojn. Gramatikaj nekorektaĵoj kaj eĉ malatento de la vere plej facila ortografio malvalorigas vian certe tre valoran laŭ enhavo artikolon. Kiam permesos nia tro malmulta tempo ni prilaboros ĝin. Estonte ne skribu sur ambaŭ flankoj de la manuskripto. Ne malkuraĝiĝu pro nia kritiko, ekzercadu, kiel fari ni ĉiuj devis.

*Al multaj:* Viaj artikoloj aperos en nro 4 aŭ 5.

## Bibliografio.

### La liberecana gazetaro.

Ĉi tie ni publikigas la titolojn kaj adresojn de liberecanaj gazetoj kaj revuoj. La listo estas nekompleta kaj tial ni petas ĉiujn k-dojn, ke ili tuj sciigu al ni titolon, adreson kaj ĉiujn necesajn sciojn pri la ne ankoraŭ menciitaj.

*Anglio:* Freedom, Londono. Monate.

*Argentinio:* "La Protesta", organo de FORA, Peru, 1537 Buenos Aires. Ĉiutage.

*Aŭstrio:* "Erkenntnis und Befreiung", organo de B. h. S., Klosterneuburg bei Wien, Schießstättegraben 237. Semajne.

*Brazilio:* "Der Freie Arbeiter", Rua dom Pedro II, No. 19, Porto Allegro. Semajne.

*Ĉilio:* "Accion directa", organo de IWW de Ĉilio, Correo 3, casilla 5015, Santiago. Semajne.

*Ĉinio:* "La popolara Sonorilo", Kinman, Ei-Hing Presejo, suk-Dou-Hou St., Sunwui, Kvangtung. En ĉina lingvo kaj Esp.

*Francio:* "Le Libertaire", 9 rue Louis Blanc, Paris Xe. Semajne. — "Weckruf", Mülhausen, Haute-Rhin, Tränkgäßchen 3. Semajne. — "La Revue Anarchiste", 9, rue Louis Blanc, Parizo. Monate en 4a jaro. — "Plus Loin", 15, rue Ferdinand-Duval, Paris IV. — "Bulletin Mensuel du Comité de Secours aux Anarchistes persécutés en Bulgarie", 9, rue Louis Blanc. — "L'En Dehors", 22, Cite St. Joseph, Orléans, Loiret. Dusemajne. — "L'Idée Libre", Conflans St. Honorine S. & O. Monate. — "L'Insurgé", 299, rue de Charenton, Paris.

*Germanio:* "Der freie Arbeiter", Berlin O 17, Bödikerstraße 30. Semajne. — "Der Syndikalist", organo de FAUD, Berlin O 34, Warschauer Str. 62. Semajne. — "Die Einheitsfront", W. Brodehl, Berlin O 17, Müncheberger Str. 13. Monate. — "Die Aktion", Berlin-Wilmersdorf, Kaiserallee 222. Duonmonata. — "Proletarischer Zeitgeist."

*Hispanio:* "Solidaridad Obrera", organo de CNT, calle del Asalto 58, 1°, Barcelona. Ĉiutage. — "Solidaridad Obrera", organo de regiona organizaĵo de Asturio, Cabrales 38, Gijon-Asturias. Semajne. — "El Productor", Calle Cataluña, 22, 1.°, 2. a, Barcelona.

